



# HUNGARA VIVO

3

1976

8.- Ft



*Se vi volas refreŝigi.*

*Ni konsilas al vi trinki*

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio  
 Adreso: H—1081 Budapeŝt  
 VIII. Kenyérmező u. 6.  
 Poŝta adreso: H—1368 Budapeŝt  
 Pf.: 193.  
 Aperas dumonate  
 XV. jaro 1976. 2-a numero


**Numero pri la hungara popolararto**

**ENHAVO**

<i>Gyula Ortutay</i> : La hungara popolararto	1
<i>Alfonso Pechan</i> : Kelkaj vortoj pri hungaraj popolaj baladoj	4
Soldata kanto (Tr. <i>M. Fejes</i> )	4
Knabinejoj karaj (Tr. <i>A. Pechan</i> )	5
Montetflanke du ŝafistoj vivis (Tr. <i>M. Fejes</i> )	5
La pigra kato (Tr. <i>István László</i> )	6
<i>László Molnár</i> : Bori Kis Jankó (Tr. <i>L. Rieth</i> )	7
<i>Gy. Domanovszky</i> : Popola artmetio (Tr. <i>T. Ujlaky-Nagy</i> )	8
Trogo	10
<i>Lajos Lesznai</i> : Hungara popolmuziko	11
<i>Szilárd Bálint</i> : Panoramo	12
Enketo de HV	14
Enhavtabelo de HV, 1971—1975.	15
Interparolo kun d-ro <i>Árpád Csanádi</i>	20
Nova ĉefepiskopo	21
Studenta paĝo	22
<i>Gyula Illyés</i> : Harfajnaj radiketoj (Tr. <i>Éva kaj Bernard Golden</i> )	23
Humuro	25
Kalendaro	26
Ŝakistoj atentu	26
La tutmonda esperantistaro kondolencas	26
<i>J. Korinek</i> : Krevis la kordo	27
<i>L. Jevsejeva</i> : In memoriam	27
<i>L. Tárkony</i> : Kalocsay	27
Revuo de Revuoj ( <i>M. R. Szabó</i> )	28
Recenzoj ( <i>V. Benczik</i> )	29
Paĝo de FERI'	31
Leterkesto, Korespondi deziras	32
Sur la titolpaĝo: Vilaĝa preĝejo en Szenna. Foto de Péter Korniss	

**Gyula Ortutay\***

# La hungara popolararto




La esprimo popolararto por ni signifas de post longa tempo nur unu ŝpecon de la kreo far nia popolo, proksimume tion, kion signifas la belartoj kaj la artindustrio en nia urba kulturo. Al la folkloro apartenas la formo kaj ornamo de la kostumo, la domo, la ĉambro-instalaĵoj. Kromaj objektoj kaj kampoj de la artista emo de nia popolo, kiel ĝenerale la kamparana arta praktikado, ne ekzistas. La demando de la tiel nomataj pratalentuloj — kaj la „popolartaĵoj” kaj kreaĵoj fare de tiuj — pretendas apartan prijuĝon kaj pritrakton. Mi povas precizigi jam nun, ke tiuj lastaj ne apartenas rekte al la kategorio de la popolararto, la mondo de pratalentuloj estas tute alia.

Estas videble ankaŭ surbaze de ĉio ĉi — en la ceteroj mi transiros al tiu temo —, ke nia popolo ne altigis siajn belartojn super sian ĉiutagan vivon, nek iu popolararta „kreaĵo” iĝis sendependa faraĵo, kiel la bildoj, statuoj en nia Eŭropa kulturo. Ĉiu arta talentulo de la kamparana kulturo — ĉu en Hungario, ĉu aliloke — priservis ekskluzive la ĉiutagan vivon. Se estis dekorado, tiam nedisigebla dekorado; aparte, elŝirite el la ordo de la kamparana vivo, perdas sian originalan signifon, rolon; kaj farigis muzea objekto, kiu tiel rigardas nin, kiel la mumio tra la malvarmaj vitrotabuloj; aŭ fremda, kurioza ornamaĵo, de modernaj urbaj loĝejoj, kiun ni fiere montras, sed tiel la urbaj loĝejoj nur iomete memorigas nin

je la originala tasko de la dekorado.

Do, kio estas la esenco de la kamparana artista praktikado, kio karakterizas plej bone la artisman hungaran vilaĝon? Eĉ antaŭ ol mi serĉus la respondon al tiu demando, intere mi devas diri, ke en la bazaj aspektoj la hungara popolararto estas en multo parenco de la kamparanaj popoloj de Eŭropo, kiel ankaŭ en la rakontado kaj kantado. Ĉi tie ni unuavice ne pensas sole pri parenceco de motivoj, kiel ankaŭ ne eblas tiom simple kompari la motivojn de la hungaraj popolfabeloj aŭ baladoj kun ties Eŭropaj varianto-parencoj. Kvankam estas vere, ke ankaŭ la parenco de la nudaj motivoj estas pli facile kaj pli klare pruvebla tasko, ĉar la identeco, simileco en la popolarartaj motivoj pli facile proponiĝas, kio estas konsekvenco de la sameco de uzataj materioj; ligno, teksaĵo, ostoj. La ekzistantaj dispozicioj en la materio sufiĉe limigas la rondojn de figuradoj sti-

\* *Gyula Ortutay*, akademiano, la plej granda vivanta scienculo de la hungara etnografio. La fakuloj de tuta Eŭropo bone konas kaj estimas lian verkon. Liaj esencaj libroj aperis en pluraj Eŭropaj lingvoj en la lastaj jardekoj. La supra studo estas unu el la signifaj de la volumo titolita „*Eta hungara etnografio*”, aperinta en kvara eldono en 1966 (unua en 1940). La studon ni povas publikigi nur mallongigite. (La Redaktoro)



*Kampara Madono. Foto de János Eifert*

lizitaj kaj naturalismaj. Tio estas la principo de la popolarta materialo.

Sed la parenceco montriĝas unuavice en tio, kiel malsamaj kamparanaroj de Eŭropo pretigis siajn artokarakterajn produktaĵojn, kiel utiligis ilin, kaj kiel tiuj objektoj fariĝis kvazaŭ parto de la ĉiutaga vivo. Kompreneble, tiu parenceco jam rezultas el la parenco-situacio kaj ebleco de la kamparanaj kulturoj kaj socioj. Kaj dum popoloj de Okcidenta Eŭropo jam pli-malpli elŝiriĝis de tiu rondo, tiam la Orient-Eŭropa kaj Sud-Eŭropa kampularo montaras ankoraŭ multan parencecon en ĉiuj ĉi trajtoj. En tiuj kreaĵoj

precipe riĉajn kaj valorajn materialojn reprezentas la popolararto de la etna grupo de la hungararo. Kaj se ni laŭmerite estas fieraj pri la malserena beleco de niaj balaĵoj, pri la ludema sorĉo de niaj fabeloj, pri la sonorado de niaj popolaj melodioj, ĝuste tiom ni povas esti fieraj ankaŭ pri la kreaĵoj de la arta aktivado de nia popolo.

Sed ni returniĝu al la supre menciita demando: kio estas la esenco de la kamparana arto, kiuj estas ties bazaj trajtoj? Ni komencu ĉirkaŭrigardi en iu vilaĝo, kie ankoraŭ validas la malnova kamparana ordo, la arta tradicio meze de la ŝanĝoj de la hodiaŭo. Ni atentu pri la zorgema laboro de lignoskulptanta ŝafisto, kiel li beligas siajn pretiĝantajn faraĵojn: hokan bastonon, „trinkoglason” el ligno; aŭ pri la laboro de la tekstistinoj — la „skribantaj virinoj” —, kiuj plenpentras la tutan vestiblon per floraj motivoj: kaj ni baldaŭ trovos samajn laŭleĝecojn. La unua grava leĝo — pri kiu mi komence vekis la atenton — estas, ke la kamparanaj artefaraĵoj, laŭcele, en tio diferencas de la Eŭropaj grandaj artoj, ke ili eĉ por momento ne disiĝas de la ĉiutaga vivo, ja ĝuste tio estas ilia rolo, funkcio, ke ili servu la ĉiutagan vivon; kvazaŭ altigas, faras pli bela, pli akceptebla la kamparanan laboron, la vivon de la vilaĝa popolo. Se ni okaze enpromenas en tian vilaĝon (ekz. ni elektu unu el niaj *palóc*\*-aj vilaĝoj), kie ankoraŭ viglas la popola ornameo, senteblas, ke niaj urbaj loĝejoj estas palaj kaj malluksaj kompare kun tiu riĉa ritmo de la kuraĝaj kaj fortaj koloroj: ĉie kaj ĉio estas nura koloro kaj pulsado, la teksaĵoj pezaj, ruĝkoloraj, la litoj ĝisplafone ŝarĝitaj per kusenoj,

\* *Palóc* estas nomo de nordhungara etna grupo (nomata ankaŭ *matyó*).

ceramikoj sur la muroj, sur bele pentritaj bretoj — la tuto estas ritmo de koloroj, flikaĵoj, linioj. Sur la vojoj, en la domoj moviĝas multjupaj virinoj en kolora kostumo: la tutan stilon ni povus nomi popolbaroka. La hungara popolararto ricevis sufiĉe multon, precipe detalojn de tiu epokstilo; pri tio ekmemorigas la plenŝtopiteco, la festa pompo, la arteco superŝutante la vivon, la koloroj, la karusela abundo de la formoj.

La dua fundamenta trajto de la popola arta aktivado estas, ke ĝi preskaŭ neniam toleras en sia formomondo arbitrajn iniciativojn, individuajn divenojn. Tio klarigas la multvaloran konservemon de la kamparana artismado; tiun fakton, ke ekzemple inter niaj skulptaĵoj, ornamaj motivoj eĉ nuntempe troviĝas motivoj, kiuj estas rektaj parencoj de kelkaj formotrezoroj de la ŝtonepoka Eŭropa kulturo. Tiu rigora ordo gardas la formojn de la tradicio, kiu lasas enveni ĉiujn fremdajn influojn (efektojn originajn de alia nacio, de pli altaj sociaj klasoj) nur pere de sia filtrilo, tiel asimilante la fremdan elementon.

Aliflanke, estas tiu kunresona komunuma emo, kiu eksplikas — kaj ne temas pri nura paradokso —, ke nova stilo, nova formo, nova „modo”, se ekŝatata far la popolo, kvazaŭ senreziste, kuratake disvastiĝas kaj tuj ĝeneraliĝas en la eta aŭ pli vasta cirklo, kien la efikoj atingas.

La tria kaj multe menciita grava leĝo de nia popolararto estas la materialo. Nia popolo ĉiam konvene elektadis substancojn por la ornamadoj: diversajn lignojn por la diversaj objektoj, laŭ la naturo de la efektivigenda laboro; en la ornamaj procedoj fidele konformiĝas al la eblecoj de la materialo.



*Malnova kampara ĉambro. Foto de J. Eifert*

Eĉ kiam tiu leĝo ne validiĝas — ĉe la teksaĵoj, brodaĵoj —, tio okazas nek arbitre, nek incite.

La ŝanĝiganta tempo kaj la disvastiĝo de la urbaneco ekatakis ĉiun kampon de nia malnova kamparana kulturo, inkluzive la popolarton. Krome, la kamparanaro pro kompreneblaj sociaj kaŭzoj volonte ekŝiĝis de sia kostumo pleje perfidanta la kamparanecon, kaj disiĝis de siaj loĝinstalaĵoj, de siaj kamparanaj iloj: tiel poste la vilaĝanaro senhaviĝis de la arta flanko de la vivo. Jam nur en dissemnitaj lokoj estas trovebla, en diversaj landregionoj, la malnova, vigla mondo de la popolarto. Multfoje malaperas nur la detaloj, sed videblas, ke la tuta popola arto ne povos rezisti al la moderna

civilizacio kaj al la metodoj de la fabrika, industria produktado. Sed okazas multloke en la lando, ke entuziasmuloj denove ekŝatigas la popolarton kaj kostumon. Ĉu tio estos longviva, aŭ nur mallonga modo, ankoraŭ ne decideblas. Sed estas certe, ke oni ne devas honti jam pri la popolkostumo, kiel dum tempo de la socia kripliĝo de la kampularo. Tamen ni opinias, ke apenaŭ venos kreiva, nova epoko de la popola ornamarto, de la popolkostumo. Kaj tio ne estas ia profetaĵo. Jam multaj diskutoj okazis pri tio, ĉu ankaŭ la komunumoj de la socialisma socio (kamparana aŭ ne kamparana) necese kreos propran *popolpoezion komunumkarakteran, obeantan al kolektivaj estetikaj leĝoj*, propran

socialisman popolarton. Mi mem rimarkas nur, ke ĉi tiu tezo estas plie iu teoria principo, malatenta ĉiun realan enhavon, realajn procezojn videble okazantajn. La ŝanĝiĝo de la vilaĝo (kaj ĝia maljuniĝo!) havas tiajn dimensiojn, ke ni ne povas paroli pri la elformiĝo de nova, socialisma arto. Nia socialisma kulturpolitiko (gardanta ĉiun valoran popolaratan tradicion: en lerneja instruado, sur scenejo, en ĥoroj, muzeoj) ja edukas, surbaze de la individuaj respondeco kaj kapableco, en la lerneja kaj kromlerneja aĝo; kaj konvene al la moderna socia labordivido, ĝi ne povas ambicii la realigon de la „kolektivaj artaj kreaĵformoj”.

Tr.: Mária Rózsa Szabó

# KELKAJ VORTOJ PRI HUNGARAJ POPOLAJ BALADOJ

La temo de multaj popolaj baladoj estas ofte internacia. Kelkaj travivas jarcentojn, tamen la kerno, ofte eĉ la vortoj, versoj restas. Ili transpasas limojn, aŭ se la landlimoj „migras”, la kantojn oni plu kantas en la nova medio laŭ la originala melodio, en la originala lingvo. Tiuj kantoj eĉ helpas konservi la originalajn naciajn kutimojn, gepatran lingvon en maro de fremdaj lingvoj.

Dum longa tempo nek tekstoj, nek melodioj estis notitaj, ili estis transprenitaj de buŝo al buŝo, de orelo al orelo. Kelkfoje vortoj, versoj, eĉ strofoj forgesiĝis, perdiĝis, laŭbezone oni eltrovis novajn vortojn, novajn versojn por kompletigi la enhavon. Eĉ en najbaraj lokoj estas kelkfoje iom varia la teksto, aŭ la melodio, ne unufoje ni trovas al la sama kanto, balado plurajn, plene diferencajn melodiojn.

La temo de „falinta knabino” estas konata en variacioj preskaŭ en tuta Eŭropo. Unu el la melodioj, kiun ni uzas ĉi tie, devenas el Moldavio kaj Transilvanio, parte apartenantaj nun al Sovetunio, aŭ al Rumanio. En tiuj landpartoj oriente kaj okcidente de la Karpatoj, en dissemitaj vilaĝoj loĝas hungaraj grupoj, nomantaj sin „ĉango-hungaroj”, kies kelkaj gentoj dum la migrado de la hungararo antaŭ la patri-okupo (naŭa jc.) jam loĝiĝis sur sia loko, kelkaj grupoj en la postaj jarcentoj eĉ ĝis la 18-a migradis jen orienten, jen okcidenten.

Ĉefa loko de pluraj variantoj estas kantataj en sikula regiono (hungara gento vivanta en Transilvanio, Rumanio), kaj kompreneble ankaŭ en la nuna Hungario. En vilaĝo *Kibéd* (rumane *Chibed*) oni kantas la strofojn de tiu balado en vicordo: 14, 15, 16, 18, 6, 7, 9, 10, 11, — la aliajn ili jam forgesis, aŭ eĉ ne konis.

Alia balado pri la „murdita fraŭlo”<sup>\*</sup> estas konata en *Hortobágy* — la vasta „puszta” (legu: pusta) apud urbo *Debrecen*, kaj en Moldavio en vilaĝeto *Klészse* (kleĵe) sude de *Bako*, sur dekstra bordo de rivero *Seret*

(*Stret*). Tiu balado estas kantata laŭ diversaj melodioj, unu el ili estas preskaŭ identa kun tiu de la „falinta knabino”.

De kelkaj baladoj kelkfoje eĉ 15—20 strofojn oni kantas laŭ la 6—8 takta sama melodio, do oni adaptas la ritmon de la melodio al la bezonoj de la strofo. Ankaŭ en la E-a traduko oni povas (eĉ devas) kelkloke ŝanĝi la ritmon laŭ la E-a teksto aŭ akcento. Ekz. v — je — — aŭ eĉ je — v.

En tiuj kantoj la popola kantisto aŭ kantistino „verkis” kelkfoje primitivajn rimojn, kaj — laŭ la bezonoj de la enhavo — ankaŭ la rimformulo ŝanĝiĝas en sama balado en la sinsekvaj strofoj: aaaa, aaba, abcc, ktp. La tradukinto provis sekvi tiujn rimformulojn kaj permesis al si laŭ la originalo kelkfoje uzi asonancajn rimojn. Tio eble helpas reprodukti la originalan etoson, atmosferon de la etna poeziaĵo. Ni ja devas pripensi, ke tiujn baladojn kreis ne „profesiaj” poetoj, muzikistoj, sed etnanoj, kiuj ofte eĉ legi-skribi ne sciis.

Ĉefe de post la dua duono de 19<sup>a</sup> pasinta jc. oni komencis pri atenti, studi, kaj kolekti tiujn kantojn. Kun fonografo en la mano oni kantigis maljunulojn, maljunulinojn, kiuj en sia infana aĝo lernis tiujn kantojn de la tiamaj avoj, avinoj.

En *Klészse* la plej multajn kantojn kantis olda vidvino Gyurkáné *Mikló* (1894—1970): ŝiaj baladoj, kantoj estis surbendigitaj ekde 1954 ĝis ŝia morto. Ŝi „diris”, kantis 163 kantojn, „versajn tekstojn” parigitajn al 64 diversaj melodioj. Inter tiuj estis 26 baladoj, 59 amkantoj, ktp. — entute 1010 strofoj da 3786 versoj! Lernejon ŝi neniam vizitis, ĉar en ŝia tempo oni sendis al lernejo por lerni legadon, skribadon — nur la „bubojn”, do, la knabojn.

Ŝiaj klarigoj: „Tiuj estas tiaj knabinaj kantoj. Kiam mi estis knabine to, ke mi ĉi kanton aŭdis, mi tuj ek lernis. En mia knabina tempo eĉ ni komencis fari kanton. *Kiu* kie iradis? *Kiun* kisis? *Kun* kiu parolis? *Kion* faris? — Mi ĝoje diras al vi (al la kolektinta sikula instruisto *Zoltán Kallós*) ĉiun, kiun mi konas, sed ne ĉiam mi rememoras jam pri ĉiu. Ankaŭ la kurtajn kantojn mi „diras”, kiam mi ekmemoras, sed mi preferas ĉi longajn. De kiam mi oldiĝis, mi multe forgesis. Kiam mi estis juna, mi multe pli sciis...”

Alfonso Pechan

\* Vidu HV 1974/4

## SOLDATA KANTO

*Ronda ĉapelet' de Garibaldi,  
trikoloro flirtas por ornami,  
trikolora banto jen kokardas,  
nom' de Kossuth de ĝi brile al ni ardas.*

*Glob' de tur' Viena rompe estas.  
Garibaldi en batalon hastas.  
Trinkus jam ĉeval' de Garibaldi,  
— hungarino juna donu akvon al ĝi!*

*En milokcentsesdekdua jaro  
li suriris supron de montaro.  
Hungarion volis pririgardi  
kaj batalon de husaroj Garibaldi.*

Tr.: M. Fejes

Tempo giusto ♩=104

Kna- bi - ne- toj ka - raj,

Es- tu vi sin- gar - daj,

Al la fraŭ- lo pa - rajn

Ki- sojn ja ne do - nu !

## KNABINETOJ KARAJ

(La falinta knabino)

Popolbalado

— Knabinetoj karaj, estu vi singardaj,  
Al la fraŭlo parajn kisojn ja ne donu!

Se vi kison paran donas malavaran,  
Naŭ monatojn poste pentos vi tremfoste.

Jen mi kisis kore, pentis mi milfoje,  
Kusis mi sendorme en la lito plore.

Dio mia helpu, ke mi ja ne velku!  
Eĉ bendo triobla por mi ne sufiĉa?

Gis nun du-duona bendo estis bona,  
Sed jam tri-duona estas tre bezona.

Dio mia diru, kio min atingas,  
Ke la antaŭtuko tiel kurte svingas?

Ĉu tajlor' eraris, kudrist' ne riparis?  
Aŭ per sia amo la amato faris?

La tajlor' bonfaris, la kudrist' ne ŝparis,  
Nur per sia amo min amat' amaris.

— Kunulinoj venu, ŝin de hejmo portu,  
Ŝin de hejmo portu, al prizon' eskortu!

— Panjo, kara panjo, ho permesu al mi,  
En la ĉambro mia vestojn ekrigardi!

Vestoj, miaj roboj, belaj karaj roboj,  
Falu sur min povra, iĝu mi plenkovra!

Panjo, kara panjo, ho permesu al mi,  
En ĝardeno mia florojn ekrigardi!

Floroj, miaj floroj, plenaj de odoro,  
Falu sur la teron por mi via ploro.

— Bonan nokton al vi (kara brunulino),  
ĉu vi malserenas,  
Ĉu pro vespermanĝo iom vi nun splenas?

Vinon mi alportis, trinku el pokalo,  
Via trista koro gajos pro nektaro!

— Trinku mem la vinon, vi ja faris krimon?  
Ne havis estimon misami knabinon!

Mian knabinecon vi piede tretis,  
Mi rubandon ruĝan por ĉiam demetis.

— Vin mi nur estimis ĝis al vi inklinis,  
Vin jam ne bezonas, plu neniam konas.

Tr.: A. Pechan

## MONTETFLANKE DU ŜAFISTOJ VIVIS...

(Marĉando — la ŝafej' forbrulis)

Montetflanke du ŝafistoj vivis,  
Unu riĉa, aliul' malriĉis,  
Ekparolis jene al l'alia  
la riĉulo, al ŝafist' malriĉa:

— Hej, ŝafisto, hej, ŝafist' senhava,  
Jen monujo dika, riĉenhava.  
La malriĉon mi de vi aĉetas,  
Vian karan mi aldone petas.

— Se ĉi mono estus antaŭmono,  
Kaj centoblo estus la aldono,  
Kaj por pag' la mondon vi proponus,  
Mian karan tamen mi ne donus.

La ŝafejon fajroflam' detruis,  
La ŝafist' en flamoj morte brulis,  
Brunulin' ŝafejon ĉirkaŭiras,  
La ŝafiston voki ŝi deziras.

— Brunulino, lin vi serĉas vane,  
Kiu amis vin jam mortis flame.

— Kie la tomb', kie, montru al mi,  
Ke mi povu por li plore larmi,  
Kresku sur tomb' ne dorno sed rozo,  
Ĉar li amis min de plena koro.

Rim.: La dua kaj tria strofoj estas verkitaj de Petőfi (1845). Tiu poemo („Marĉando”, tr.: K. Kalocsay) iĝis popolkanto, kaj ni vidas nun interesan ekzemplon, kiel la vilaĝaj kantistoj alproprigas poemon de sia amata poeto — kompletigante tiun laŭ propra fantazio, propraj bezonoj, gusto.

Tr.: M. Fejes



La fianĉino diras adiaŭon. Foto de P. Korniss

# La pigra kato

metis kaj ankaŭ la fajro estingiĝis. Ŝi denove diris:

— Kato, ekbruligu la fajron kaj laboru, ĉar hodiaŭ vi estos batata!

Sed la kato ne laboris.

La mastro venas hejmen, ĉirkaŭrigardas, ĉio ja estas malorde. Tuj li kaptas la katon, ligas ĝin al la dorso de sia edzino kaj daŭre batas ĝin, ĝis kiam la edzino komencas petegi:

— Ne batu plu tiun katon, ĝi ne estas kulpa, ĝi ne povas plenumi tiujn laborojn!

— Ĉu vi do promesas plenumi ĉion anstataŭ ĝi? — demandas ŝia edzo.

— Mi plenumos eĉ pli, ol kiam vi ordonis al ĝi, nur ne plu batu tiun mizerulon! — respondis la virino.

La edzineto kuris hejmen al sia patrino, plendis la aferon kaj diris:

— Mi promesis fari ĉiun laboron anstataŭ la kato, ke li ne batu ĝin tiel kruele sur mia dorso.

Ankaŭ ŝia patro alparolis:

— Se vi promesis, plenumu vi tion! Ĉar en kontraŭa kazo la kato denove estos batata!

Kaj post tiu konsilo li sendis ŝin hejmen al la edzo.

La mastro ankaŭ la sekvontan matenon ordonis al la kato, kion ĝi faru. Sed la kato denove faris nenion. La mastro do denove batis ĝin grave sur la dorso de sia edzino.

La juna edzino denove hejmenkuris por plendi, sed ŝia patro repelis ŝin tiel rigore, ke eĉ ŝiaj piedoj ne tuŝis la teron.

La trian matenon la mastro denove diris al la kato la trian ordonon. La kato jam ne povis eĉ aŭskulti la ordonon, ĝi estis tiel timigita. Tamen eĉ nun ĝi laboris nenion. Sed la juna edzino nun faris ĉion anstataŭ la kato. Nun ŝi ne forgesis, kion ŝi promesis: faris fajron, alportis akvon, pretigis mangajon, balaadis. Ŝi plenumis ĉion, kion ŝi devis fari. Tiom ŝi kortuŝiĝis pri la povra kato; ĉar, kiam ŝia edzo batis ĝin, la torturita kato premis siajn ungojn en ŝian dorson. Krome, ĉar la dubranĉa vipo atingis ankaŭ ŝian dorson ĉe ĉiu bato.

Kiam la edzo alvenis hejmen, ĉio troviĝis en ordo! La mastro jam diradas:

— Ne timu, kato, nun mi ne insultos vin!

La virino preparis ĝoje la tablon, ŝi faris preta la mangajon, metis ĝin antaŭ sian edzon, ili satiĝis kaj estis gajaj.

Poste ĉiun tagon tiel okazis: la kato ne plu estis batita kaj el la edzineto fariĝis tiel brava mastrino, kiel decas!

Tr.: István László

**F**raŭlo edzinigis senlaboran, riĉan knabinon; aldone li eĉ promesis, ke li neniam batos ŝin.

La juna edzino neniam laboris, nur iradis de domo al domo klaĉadi kaj agi aliajn aĉaĵojn.

Ŝia edzo tamen neniam batis ŝin.

Sed foje matene, kiam li iris por labori, diris al la kato:

— Kato, mi ordonas al vi, ĝis kiam mi forestos, faru ĉiun laboron, kiu estas bezonata! Forigu la balindaĵon el la domo, preparu tagmangajon je tagmezo kaj eĉ ŝpinu fadenon por unu bobeno, ĉar se vi ne faris ĉion, kiam mi revenos, mi batos vin tiel, ke vi rememoros pri tio.

La kato dormetis sur la fajrujo, milde aŭskultis la parolon ĝis fino. Sed la virino pensis interne: „Ĉi tiu mia edzo freneziĝis!”

Kaj ŝi diris:

— Edza moŝto, kial vi ordonas tiaĵojn al la kato? Ĝi ja ne povas plenumi tian ordonon!

— Ĉu povas, ĉu ne povas, por mi egale, edzino — diras la edzo — mi havas neniun alian, al kiu mi ordonu! Sed se ĝi ne faros ĉion, vidu, mi batos ĝin tiel, ke ĝi volonte tion evitintus!

Poste li iris labori. La virino komencis instigi la katon:

— Laboru kato, ĉar mia edzo batos vin!

Sed la kato ne laboris. La virino vizitis plurajn domojn kaj hejmenveninte, la kato eĉ tiam dor-



# Bori Kis Jankó

„Mi havis bonan vivon, ĉar mi estis ĉiam inter floroj” — diris onjo Bori parolante pri sia vivo, kaj certe ŝi pravis, ja floroj pompis en ŝia korteto kaj ĉambro. Laŭ ŝia manmovo dum la tuta jaro floris pli kaj pli belaj floroj, la variantoj de la t. n. *matyó*\*-rozoj — songfloroj, kiujn dum sia pli ol sepdekjara laborado ŝi formis — laŭ la naturo kaj riĉigis ilin per floroj naskitaj el sia fluganta fantazio. Ŝia vivo entenas ĉiujn etapojn de la *matyó*-popolarto: la etapon de prospero, subiĝo kaj renaskiĝo. En la tempo de ŝia naskiĝo la popolarto de *matyó*-oj en urbo *Mezőkövesd* ankoraŭ estas en frua etapo de la evoluo. Ni ne konas pli fruajn brodaĵojn el regiono de *matyó*-oj ol tiujn de la mezo de la 19-a jarcento. La dekretoj regulantaj la vestmanieron de la servutuloj ĉi tie ankaŭ estis validaj kaj tiuj bremsis la evoluon tiurilatan de la loĝantaro de la urbo *Mezőkövesd*.

Post la jaroj de la liberecmilito (1848—49), per specifa maniero evoluis kaj floris la popolarto de tiu ĉi terlaborista popolo. Ili ŝatis la belajn pentritajn meblojn, la bunte ornamitajn ceramikajn pladojn, botelojn, la pompe aranĝitajn litojn kaj iliajn broditajn kovrilojn, sed la riĉeco de la koro kaj materiala povo de la loĝantoj elmontriĝis tamen en la pompaj virinaj kaj viraj vestaĵoj dum longaj jardekoj. Kaj kiam la transformiĝo de la historiaj cirkonstancoj tute pereigis la malnovan vivformon, kiam ankaŭ por la *matyó*-oj efektiviĝis libera elekto de laboro, lernado kaj socia evoluo — anstataŭ la ĝistiana servutula laboro —, tiam la



evoluo de la popola arto ekiris sur alia vojo, ke ĝi denove igu fama la fruktojn de la popola artemo, iliajn brodaĵojn famiĝintajn tutmonde.

Hodiaŭ ili jam ne ornamas la randon de siaj litaĵoj, kaj ne portas riĉe broditajn ĉemizojn kaj oni ne povas vidi fraŭlojn kun flirtantaj manikoj. Tiujn brodaĵojn oni jam gardas en muzeoj, kiel gravan etapon de la pasinta historio de la *matyó*-popolo. Hodiaŭ en la Popolarta Kooperativo — membranta ĉ. 1300 anojn, knabinojn kaj virinojn, desegnantojn kaj brodantojn — formiĝas la nova *matyó*-arto laŭ ilia manmovo. Ili plenumas ne nur la bezonojn de la urbo, sed tiun de la tuta lando per tiaj brodaĵoj, kiuj pli beligas, pli riĉigas nian ĉirkaŭaĵon.

En la pasinto la laboro de Bori Kis Jankó, ŝia arta klopodo, preskaŭ senescepte markis la vojon de la progreso, tamen ni scias pri la aliaj konataj desegnistinoj tiutempaj. Ankaŭ la laboro en la Kooperativo ne neglektas la bonajn rezultojn de la pasinto, ĝi baziĝas sur tiuj kaj evoluigas ilin laŭ la bezonoj de nia tempo.

(En la hungara Departemento *Borsod* ĉiujare oni distingas per „Bori Kis Jankó”-premio la elstare talentajn laborantojn de la popola arto. La Redaktoro.)

Tr. L. Rieth

\**matyó* (1. matjo) finntipa gento, lokiĝinta kaj hungariĝinta sur norda teritorio de nuna Hungario samtempe kun la patri-okupado de l' hungararo (9-a jarcento)




# Popola artmetio\*

Tiun ĉi fojon ni preparolas ne tradician popolar-ton, pli ĝuste ne popolan metio-arton, sed specimenojn el tiu laboro, kiun la Landa Federacio de la Hejm-Industriaj kaj Popolaj Artmetiaj Kooperativoj faris dum la pasintaj dudek jaroj por konigi la grandajn rezultojn de la hungara popola arto. En 1953, kiam la Partio kaj la registaro establis la Federacion, oni destinis kiel unu el ĝiaj taskoj kolekti en kooperativojn la hejmajn teksistinojn kaj brodistinojn, en la lando tiam ankoraŭ en granda nombro aktivantajn, kaj potistojn, eltranĉistojn kaj tiujn, kiuj estis laborantaj en aliaj popolartaj branĉoj; certigi al ili la eblecon de trankvila laboro kaj organizi la kontinuan vendadon de aliaj kreaĵoj. Pri unu parto de la atingitaj rezultoj kaj pri kelkaj pli gravaj stacioj la ekspozicio donas informojn kompreneble tiel, ke ili ne spegulas la zorgojn kaj malfacilojn, kiujn oni renkontis en ne malgranda nombro dum la plenumado de la tasko. Ni pensas, ke ĝuste pro tio valoras, eĉ necesas diri kelkajn vortojn ankaŭ pri ili.

La teritorioj, kiuj gardis la tradiciojn de la popola arto, ekde la sojlo de la jarcento disfalis en ĉiam pli malgrandajn insulojn, kaj tiu formortada procedo — akcelita inter la du mondmilitoj — proksimiĝis al sia fino. La plej supera gvidantaro bone vidis, ke el la tradicioj de la popola arto estas trans-saveblaj multaj valoroj nur tiam, se oni estigas novajn kondiĉojn de kreado por la pluvivanta malmulto. Tio estis tasko, kiu pretendis fundan konsideron kaj persistan laboron. Por ĝia plenumo oni establis la Federacion.

Trarigardante la ĉi-celan laboradon dum la pasintaj dudek jaroj, ni povas konstati, ke la plej malfacila parto de la laboro estis ne la anigo de teksistinoj kaj brodistinoj al la Federacio, nek la kolektado de potistoj kaj eltranĉistoj\*\* laborantaj disemite en la lando, eble eĉ nek serĉi la novan vojon, la ĝustan direkton, sed la konstanta batalado kontraŭ la nekomprenemo kaj dubado, kiuj trafis la laboron el plej diversaj direktoj kaj trafadas eĉ hodiaŭ. En tiu ĉi mallonga orientiga artikolo ne estas nia tasko polemiki kontraŭ tiuj ĝis-tede ripetitaj argumentadoj, kies esenco estas jene sumigebla: la popola arto en nia lando — same kiel dise en Eŭropo — pro la ekonomia-socia transformiĝo



formortis, bazon por pluivado ne havas, kaj kio okazas cele de ĝia trans-savado, estas nenio alia ol ripetado, kopiado; konsekvence ĉio — kio estas elfarita kadre de la federacia produkta laboro —, estas nur ordinara komercaĵo sen arta valoro. Tiel oni argumentas kontraŭ la laboro de la popolartaj kaj hejmindustriaj kooperativoj. Sed kion montras fakte la vivo? Por povi demonstri tion kontentige, estas necese paroli unue pri du demandoj koneksaj kun la popola arto. La unua estas la demando pri la kreantoj. En la pasinteco oni diferencigis du specojn de popola artisto: la laŭokaze laborantan kaj la profesionan. Laŭokaze laborantaj estis ekz. la hejmaj teksistinoj kaj brodistinoj, la eltranĉistoj ktp., dume profesiaj estis la metiistoj, laborantaj por la popolo, kiuj produktis laboraĵojn kun arta valoro, kiel ekz. la peltistoj, la tajloroj de paŝtist-paltoj, la potistoj, la mielkuko-bakistoj, la tolbluigistoj, ktp. En la kadro de la kooperativa movado la unua kategorio kompreneble malaperis kaj nur en sensignifa nombro troviĝas tiaj, kiuj faras artan kreaĵon ekster la kooperativoj.

La dua kaj decide grava demando estas: por kiuj ili laboris en la pasinteco? La nomo mem: popola arto, donas la respondon: por la popolo. Kaj en tiu ĉi kazo sub popolo ni devas kompreni la kampularon. Al la du demandoj la suma respondo estas do, ke la kreantoj de popolartaj objektoj estis individuoj apartenantaj al la kampularo kaj devenantaj de tie, laborantaj laŭokaze aŭ profesie, farrante siajn laboraĵojn por la popolo, por la kampularo. Tion ni povas kompletigi per tio, ke ili faris siajn objektojn ĉiam konforme al la lokaj pretendoj kaj gusto.

\*El la Enkonduko de la katalogo de la ekspozicio aranĝita somere de 1973 en la Hungara Nacia Gale-rio.


\*\* eltranĉisto: lignoskulptisto.

Ilus K. Király (Kalocsa): Kovrilo ▶

Oni ne povas sufiĉe multe ripeti, ke la popola arto estas same tia historia kategorio, kiel kiu ajn branĉo de la artoj, konsekvence ankaŭ ĝiaj vivo-leĝoj estas same tiaj. Tiel klariĝas, ke kie — en la periodo de la mortado de la popola arto — kelkaj branĉoj de la popola arto restis ankoraŭ viv-kapablaj pro la konserva efiko de la tradicio, tie en la kooperativa movado ili pluvivis en nova formo, konforme al la novaj cirkonstancoj. Tiun ĉi novan ni nomas popola artindustrio. En la esprimo popola artindustrio la vorto „popola” aludas, ke ĝi devenas el la popola arto, estas ĝia organika daŭrigo, la „artindustrio” signas, ke en siaj taskoj kaj krea aktivado ĝi proksimiĝas al la artmetio. La kreaĵoj — kvankam devenas plejparte el la kampularo — praktikas siajn metion kaj arton jam profesie kaj ne faras agrikulturan laboron. Krome iliaj kreaĵoj estas farataj jam *ne ekskluzive* por la loĝantaro de la vilaĝoj, sed — por uzi la lingvon de la komerco — por la tutlanda merkato. Konforme al tio en diversaj regionoj la tradiciajn formoj kaj ornamo-trezorojn oni adaptas jam ne al la gusto de malpli granda komunuma unuo, sed al la pretendoj de la vasta aĉetantaro. Krome ankaŭ tio ne estas preteratentinde, ke la grand-nombra sortimento estas produktata jam en industriaj mezuroj, eĉ se tio ne estas grand-volumena, kaj la vendado okazas jam ne en la domo, en la vendo-placoj, aŭ en foiroj, ĉar tion faras jam la peranta komerco. Se ni kontraŭstarigas la suprajn difinojn de popola arto kaj popola artindustrio unu kontraŭ la alian, la diferencoj reliefigas per si mem. Koncerne sian originon, la popola arto estas esence aŭtoktona, koncerne sian evoluon — plie aŭtonoma. Vere, ke de ekstere kaj de supre ĝin atingas influoj de diversaj intensecoj, tamen dum mallonga tempo ankaŭ ili asimiliĝas al la tradicia formoj kaj ornamo-trezoro.

La popola artindustrio elkreskas el la heredaĵo de la popola arto, kaj dum sia evoluo ĝi konscie klopodas riĉigi la tradiciojn per kiel eble plej multe da elementoj prenitaj de ekstere, t. e. ĝi jam priatentas la pretendojn de la aĉetantoj. Tiu ŝanĝiĝo kondukis unuavice al la kelkfoje esenca transformiĝo de la formoj, aŭ faris luks-objektojn el la iamaj objektoj kun praktika valoro.

Ne estas nia tasko polemiki ĉi tie kontraŭ certaj rifuzaj opinioj, ni trovas pli laŭcele starigi kontraŭ



ilin kelkajn pli gravajn kaj valorajn rezultojn de la pasintaj du jardekoj. Kvankam la respondo donas la metia arto mem, tamen ni povas igi ĝin pli perceptebla, se ni emfazas kaj klarigas kelkajn temojn.

En 1953 du ministro-konsiliaj dekretoj okupiĝis pri la demando de la popola arto kaj hejmindustrio, pri la ordigo de tiuj ĉi du kampoj. Unu el la dekretoj establis la supre menciitan Federacion, determinis ĝiajn agad-kampon kaj taskojn, samtempe instrukciis pri la organizado de la Konsilio por la Popola Artmetio, kiu organo estas la konsultiĝa korporacio de la popolaj metiaj artoj, precipe en fakaj kaj principaj, duavice en praktikaj demandoj. La dua ministro-konsilia dekreto en 1953 instrukciis pri la fondo kaj donacado de la titolo „majstro de la popola arto”. La plej supera partia kaj ŝtata gvidado juĝis la popolan artindustrion tia kampo, pri kiu valoras kaj necesas okupiĝi kaj en kultura kaj en ekonomia rilatoj. Eĉ, la dua dekreto pruvas, ke la popola artmetia krea laboro estas rigardata tiom signifa, ke oni devas premi ĝin per donacado de distingita titolo.

Hodiaŭ en la lando funkcias 38 popolaj artmetiaj kaj 40 hejmindustriaj kooperativoj — en la kadro de la Federacio — kiel fundamentaj kaj bonrezultaj ekonomiaj komunumoj.

En la materialo de la metiarto multaj ekzemploj pruvas, ke en sia aktivado la popolajn metiartistojn ne kontentigas la nura kopiado kaj ripetado de la tradicia popola arto. Tiuj ĉi laboraĵoj estas do vivaj refutoj de la ĉi-rilataj negativaj kritikoj. Ni ne apelacias ĉi tie pri tiaj, kiel ekz. la eltranĉisto Antal Kapoli, la seniora, kiu ricevis jam en 1954, inter la unuaj, la titolon „majstro de la popola arto”; poste, pro sia elstara arta aktivado ankaŭ la Kossuth-premion. Ja oni povus kontraŭargumenti, ke Kapoli apartenis ankoraŭ al la lastaj grandaj figuroj de la popola arto. Pro tio ni mencias ankaŭ aliajn nomojn. Inter la projektantoj de la fama

# TROGO

Estis iam homo, ties patro jam maljunuleto. La filo ne ŝatis manĝi kune kun sia patro, ĉar la oldulo manĝadis kiel infaneto. Liaj manoj forte tremadis, do la supo ĉiam disversiĝis el la kularo. La homo cerbumis, ke li pretigos por la kadukulo trogon similan al tiuj de brutoj. Kun febra rapideco li komencis kavigi trunkon.

— Patro, kion vi faras? — scivoladis lia filo, gape observante la patran laboron.

— Kion, kion? — respondis li senpacience. — Mi pretigas trogon por via avo, kiu estas jam tro maljuna. Ne manĝu li kun ni ĉe la tablo, sed aparte el tiu ĉi ligna ujo.

— Patro mia — demandadis plu la knabeto — se vi maljuniĝos, ĉu ankaŭ mi pretigu tian trogon por vi?

Tiam en la kapo de la homo konsciiĝis, ke ankaŭ li devas maljuniĝi. Kaj li tuj frakasis la trogon.

*Maljuna virino en Kalotaszeg (Trasilvanio — Rumanio) Foto de P. Korniss*



brodado de urbo *Kalocsa*, elstara personeco estis la brodistino Ilus *Király*, kiu per siaj ĉiam pli novaj, bone konstruitaj komponaĵoj, serĉis novajn vojojn.

En la materialo de ekspozicioj valoras serĉi la brodaĵojn de urbo *Hódmezővásárhely*, kiuj estis faritaj baze de la projektoj de la brodistino Mihályné *Sárosi*, kaj per kiuj ŝi rekreis unu brodan tradicion jam formortintan meze de la 19-a jc. Similan ni povas vidi ĉe la „drap-surkudraj” brodaĵoj de la brodistino Józsefné *Gyenei*, kiu el la malnova ornam-stoko elformis tute novan komponan principon. Inter la teksistinoj *Andrásné Werner* kaj *Lászlóné Fehér* el la regiono *Sárvíz* kaj *Miklósné Nyakas* el urbo *Debrecen* renovigis la jam rigidigitan popolan arton de sia regiono, same aplikante la tradician ornamo-trezoron. La grand-premio de la Brusela Mondekspozicio, aljuĝita al *Sándor Kántor*, potisto en urbo *Karcag*, „majstro de la popola arto”, kaj la grand-premio de la Varsovia Renkonto de la Tutmonda Junularo, donacita al la eltranĉisto *Ferenc Nagy* de vilaĝo *Tab*, pruvas la internacian rekonon de la elstaraj hungaraj popolaj artindustriaj produktoj.

Longe ni povus vicigi la nomojn de tiuj, kiuj dum la pasintaj dudek jaroj kreis artaĵojn longedaŭrajn, kaj kiuj estas egalvaloraj kun tiuj, kiujn ni laŭnome menciis, kaj kiujn lastajn nur hazarde kaptis el la longa vico. Tion pruvas ankaŭ, ke de 1954 ĝis 1972 sume 104 popolaj artistoj ricevis la distingitan titolon „majstro de la popola arto”. Inter ili

troviĝas brodistino, teksistino, tajloro de paŝtist-paltoj, peltisto, eltranĉisto, potisto, „*kulacs*”-faristo\*, forĝisto, lignajisto, mielkuk-bakisto, korbo-faristo, murpentristino. Oni ne povas do diri, ke nur malmultaj atingis elstaran rezulton, kaj ankaŭ tion nur inter malvastaj fakaj kadroj. Ni scias, ke nuraj nombroj mem ne signifas grandajn rezultojn, sed jes la kreaĵoj, por kiuj ili ricevas rekonon.

Ekde la kvindekaj jaroj la hungara popola arto efikas — ĝuste tra la vivantaj popolaj artaj metioj — kun konstante pliiĝanta forto sur nian artindustrion. Ene de nia metia arto apud la Eŭropa direkto vivas ankaŭ fortika popola direkto. Spirite ĝi estas popolkaraktera, samtempe fidela, ĝi esprimas la vidmanieron de nia epoko. La popola metia arto havas do ankaŭ tiun rolon, ke ĝi partoprenas en la elformado de naci-karakterata artindustriara direkto. Ankaŭ tio ĉi ne estas preterlasinda faktoro.


Inter tiuj, kiuj finstudis la Artmetian Altlernejon, troviĝas jam ne malmultaj, kiuj laboras laŭprograme super la elformado de popola-nacia stilo. La signoj montras, ke ilia eksperimento estos pli rezulta kaj pli vera ol la similaj strebadoj ĉe la sojlo de la nuna jarcento.

La Skandinavaĵoj kaj Baltaj landoj montras belan ekzemplon, ke la moderna artmetio povas esti konsiderinda iniciatilo al la estigo de artindustrio kun nacia-popola karaktero.

Tr. Tibor *Ujlaky*—*Nagy*

\**kulacs*: ligna aŭ lada botelo

# Hungara popol- muziko



La historio de ĉiu popolo komen-  
ciĝas per nebulaj ideoj, mitaj legen-  
doj kaj el ili, post multaj transiroj,  
sekvas la historio, bazita sur faktoj  
kaj pruviloj.

La arto de la popolo apartenas al  
la valoraj trezoroj de ĝia prahistorio,  
precipe de ĝiaj plej malnovaj tavoloj.

Jen kelkaj ĝeneralajoj, kiujn oni  
povas konstati pri la plejmulto de la  
Eŭropaj kulturoj. Sed ĉi tiuj konsta-  
toj validas eĉ pli rilate la muzik-  
historion de la hungara popolo. Neni-  
am ni devas forgesi la fakton, ke la  
antaŭeniĝo de la moderna Eŭropa  
muzikkulturo, la gvida rolo de la  
hungara muzikkulturo en la okciden-  
ta muzika vivo baziĝas sur la mal-  
kovro de la vera, ne falsigita hungara  
popolkanto. Du grandaj geniuloj: Bé-  
la Bartók kaj Zoltán Kodály ne nur  
malkovris la hungaran kamparanan  
kanton, sed ili sciis, kiamaniere lerni  
de ĝi. Jen, kiel ili fariĝis mondfamaj,  
elstaraj komponistoj.

La studado de la hungara muzik-  
historio estas do tre instrua eĉ el ĝe-  
neralaj vidpunktoj.

La historio de la hungara muzik-  
kulturo etendiĝas ĝis la unuaj jar-  
centoj de nia ero, kiam la finno-ug-  
raj kaj la turkaj triboj unuiĝis je  
pli-malpli homogena nacio. Ĉi tiu  
unuiĝo estis sekvo de la grandaj po-  
polmigradoj de tiu epoko. La muzi-  
kaj trezoroj restintaj ĝis hodiaŭ estas  
grava parto de la nuntempa hungara  
popolmuziko.

Kiam komence de nia jarcento  
Bartók kaj Kodály la unuan fojon  
renkontiĝis kun la hungara kampa-  
rana kanto, ili ankoraŭ trovis melo-  
diojn, kiuj similis al kelkaj aziaj —  
ĉinaj, manŝi, hanti ktp. — kantoj, ki-  
uj portis similajn, eĉ identajn ecojn.

Kiuj estas do tiuj karakterajoj? La  
hungaraj kamparanaj kantoj estas,  
kun malmultaj esceptoj, kvarliniaj.  
Karakterizaj estas la fintonoj de la  
melodilinioj, kiuj ofte similas al tiuj  
de la hungaraj popolmelodioj mal-  
novstilaj. Interesa eco de ĉi tiuj me-  
lodioj estas, ke el la kvar melodilini-

oj la du lastaj estas ripeto de la unu-  
aj du, transponita kvin tonojn pli  
malalten. Ĝenerale la hungaraj po-  
polmelodioj havas malalten irantan  
tendencon. (Analogajn ecojn oni tro-  
vas eĉ en kelkaj turnoj de la hunga-  
ra lingvo.) Speciala kaj eble plej gra-  
va karakterajo de la hungara popol-  
kanto malnovstila estas la t. n. pen-  
tatonio (t. e. la regado de la kvinto-  
na, senduontona gamo.) Ĉi tiu eco es-  
tas eble plej facile ekkonebla inter  
la trajtoj de la hungara popolmuzi-  
ko.

La hungaraj kamparanaj kantoj  
eksonas en diversaj taktmezuroj; ili  
strikte sekvas la parolatan lingvon  
(*tempo parlando*); laŭ individua hu-  
moro ĝi povas de tempo al tempo ra-  
pidiĝi aŭ malrapidiĝi (*tempo rubato*);  
ĝi povas esti regula, rigida kiel ekz.  
la danmelodioj (*tempo giusto*). Gra-  
ve estas, ke la malnovstilaj melodioj  
enhavas multajn tradiciajn ornama-  
ojn, kiuj dependas de la talento kaj  
emo de la kantanto.

El ĉiuj ĉi karakterecoj sekvas, ke  
la malnovstila hungara kamparana  
kanto ne povas esti kantata en ĥoro,  
*sole unisono*.

Koncerne la tekston: la hungaraj  
popolkantoj, precipe la malnovstilaj,  
ne estas organike kunligitaj kun cer-  
taj melodioj. „*Ju pli kamparanaj es-  
tas la melodioj, des malpli speciali-  
ĝas la opaj tekstoj je la opaj melodi-  
oj...*” (Bartók)

Ĝis nun ni okupiĝis pri la plej mal-  
novaj tavoloj de la hungara popol-  
kanto. Sed la sekvaj popolmuzikaj  
stilepokoj estas same interesaj. Ĉir-  
kaŭ la fino de la pasinta jarmilo la  
hungaroj kroĉiĝis al Okcident-Eŭro-  
po ne nur politike kaj ekonomie, sed  
ankaŭ el kultura vidpunkto. Ĉi tiu  
fakto estas konstatebla ankaŭ en la  
muziko de la popolo. Karakterajoj de  
la najbaraj kaj pli foraj okcidentaj  
popolmuzikkulturoj riĉigis la hunga-  
ran popolan muzikon. La plej granda  
diferenco de la malnova muziko es-  
tis la ekapero de la diatonio (t. e. la  
regado de la oktona gamo); en ĉi tiu  
gamo statis la Okcident-Eŭropa mu-

zikkulturo entute ĝis la plej lasta  
tempo. Interesa grupo de la mezepo-  
ko estas la hungaraj historiaj (kroni-  
kaj) kantoj, kiuj enhavas certajn tur-  
niĝojn de la ekleziaj kantoj mezepo-  
kaj.

La plej evidenta pruvilo pri la mu-  
zika talento kaj krea forto de la hun-  
gara popolo estas la fakto, ke eĉ en  
niaj tagoj ekestas nova kaj tre riĉa  
popolmuzika stilo en Hungario. La  
plej grandaj trajtoj de la novstilaj  
hungaraj popolkantoj estas antaŭ ĉio  
ilia fermita (*repriza-ripeta*) struk-  
turo: la unua kaj la lasta melodilini-  
oj estas identaj. La gamoj jam ne es-  
tas pentoniaj, sed la t. n. „ekleziaj”  
gamoj (dora, eola, miksolida ktp.);  
aperas jam la majoraj-minoraj ga-  
moj. Sed multaj pentoniaj melodi-  
turnoj restis eĉ en la plej novaj hun-  
garaj popolkantoj.

Koncerne la muzikinstrumentan  
kulturon de la hungara popolo ni de-  
vas unue rimarki, ke la eksterlanda-  
noj antaŭ ĉio en la ciganoj pensas  
trovi la verajn reprezentantojn de la  
hungara popolmuziko. Sed ĉi tiu opi-  
nio baziĝas sur miskompreno de la  
faktoj. La hungaraj kamparanoj *kan-  
tas* prefere, ol ludas instrumentojn.  
Post malkovro de la vera, ne falsigita  
kamparana popolmuziko la muzikin-  
strumentoj ĉiam pli kaj pli malaperis  
el la hungara popolmuzikkulturo (es-  
cepte la hungaran memfaritan cit-  
ron), kaj la eksterlandanoj, venan-  
taj en nian landon pli kaj pli bone  
komprenas, ke la cigana muziko,  
kvankam hungarkarakterata, ne estas  
la vera, tradicia popolmuziko. La  
muziko, ludata per la ciganoj loĝan-  
taj en urboj, estas proporcie malfrua  
kultura fakto; ĝi konsistas plejparte  
el hungaraj urbaj romanĉoj de la dua  
duono de l' pasinta jarcento.

Jen la malmulto, kion ni volis diri  
pri la hungara popolmuziko. Ni espe-  
ras, ke niaj eksterlandaj gastoj, vizi-  
tantaj nian landon, serĉos kaj komp-  
renos la veran, valoran trezoron de  
la hungara popolo: ĝian popolmuzi-  
kon.

Lajos Lesznai



Antal Kapoli

Oni anoncis landan konkurson por la memoro de popola lignoskulptisto Antal Kapoli. La alsenditajn uzobjektojn, meblojn kaj lignoskulptaĵojn oni ekspozicias en la kulturdomo de la vilaĝo Balatonlelle, kie ĉi-jare post aŭgusto estos la disdono de diversaj premioj.

\*

Kun la titolo: „Hungarlandaj popolaj lignoskulptaĵoj” estis inaŭgurita ekspozicio ankoraŭ en la muzeo de urbo Hatvan. Ĝis nun la diversaj popolartaj skulptaĵoj troviĝantaj en la muzeaj deponejoj kaj en privataj kolektoj apenaŭ estis konataj. Eĉ la plej belaj ekzempleroj nur malofte estis videblaj en etnografiaj ekspozicioj, ĉar la fakscienculoj longtempe ne sciis en kiun artospecon oni klasigu tiujn. Nuntempe jam estas konsentite, ke tiuj objektoj certe estas popolaj inspiraĵoj, ĉar ili estis ja ĉiutagaj uzobjektoj de la vilaĝa vivo.

\*

La gobleno originale estas flamanda brodaĵo, tamen en la mondmerkato oni konas ĝin kiel hungara brodaĵo. Jam en la mezo de 19-a jarcento multajn goblenojn oni liveris el Hungario al eksterlando. Nuntempe en 28 landoj estas debita varo la hungara gobleno, krom Eŭropo oni aĉetas ĝin en Usono, Kanado, Aŭstralio, Japanio. La valoro de la ĉiujara eksporto estas pr. 600 mil dolaroj. En Hungario nur unu uzino — Goblena Dominindustria Kooperativo — okupiĝas pri la farado de admirindaj goblenoj, kiujn pli ol 3 mil virinoj preparas per hejma laboro. En nia lando, krom Budapeŝto en 9 diversaj vilaĝoj funkcias transdona-transprena agentejo, kie oni administras la domindustrian laboron. La pretigo de gobleno pretendas multan tempon kaj subtilan manan laboron. Sur la bazmaterialon la virinoj per lanaj — aŭ silkaj — fadenoj brodas la modelojn, foje foje 220 stebojn oni devas fari sur unu kvadracentimetron. Al tiuj manlaboraĵoj ili uzas 400 kolornuancojn! Ne ĉiu virino povas fari tiun laboron, ĉar necesas senfina pacienco kaj bonegaj okuloj. Al ĉiu deziro estas konvena plandesegnaĵo, ekde la 14-a jarcentaj modeloj ĝis la plej modernaj. Tre popularaj estas la hungareskaj flormodeloj kaj la reproduktoj de mondfamaj pentraĵoj. La popolartistinoj ĉefe vintre laboras, kiam ne estas urĝaj agrikulturaj laboroj.

\*

Antal Doráti, fama hungara kapelestro — kiu nun vivas eksterlande kaj estis disĉiplo de Kodály, Bartók kaj Weiner — komponis kvin kanonojn por 3 kaj 4 voĉaj ĥoroj je la poemoj de Dezső Keresztúry.

En Tokio la t. n. Galerio Gekkoso aĉetis 600 hungarajn pentraĵojn kaj el tiuj 300 bildojn ekspozicias en la grandmagazeno Mitsukoshi. Tiu ekspozicio estas la unua, kiun la japana galerio prezentas en la komerca centro de la ĉefurbo. Laŭ la programo de Galerio Gekkoso, ili aranĝos ankoraŭ kvin ekspoziciojn en Tokio kaj Yokohamo el la bildoj de hungaraj pentristoj. Okaze de malfermo de la nuna ekspozicio partoprenis kaj diris paroladon la hungara ambasadoro Ernő Horváth.

\*

La vidvino de fama hungara pentristo István Dési Huber, donacis al la hungara departemento Vas plurcent pentraĵojn, grafikojn de sia edzo. Krom tiuj la sinjorino transdonis la librojn, kiuj rilatas la verkaron de Dési Huber kaj ĉiujn dokumentojn, verkojn, leterojn, katalogojn kaj personajn memoraĵojn. En urbo Szombathely la urba konsilantaro konstruos muzeon, kies nomo estos: Memormuzeo Dési Huber István.

\*

En la fortikaĵo de urbo Eger jam ekde jaroj funkcias la burĝteatro, kie ĉi-somere jam pli ol mil rigardantoj povas ĝui la historiajn romantikajn prezentadojn. La nunan plej novan sukceson rikoltis la teatra prezentaĵo: „La reĝlando de forĝisto Andreo”. La ĉefideon donis la prozo: „La historio de Poncianus”, kiun verkis Gáspár Heltai en la jaro 1573.

\*

Ilona Brestyánszky, arthistoriistino malfermis la ekspozicion de pentristo István Barta en la arta klubo „Fészek” en Budapeŝto. La grandsukcesa ekspozicio estos vizitebla ĝis la monato decembro.



Murpentristino el Kalocsa. Foto de P. Korniss

# panorama

La Federacio de Demokrataj Hungaraj Sudslavoj en la monato marto kunsidis en Budapeŝt. La ĉefsekretario de la Federacio, Mihály Mándics raportis pri tio, ke perhelpe de la hungara ŝtato ageme disvolviĝas la evoluado de slava gepatra lingvo. En Hungario funkcias 405 gentaj infanĝardenoj, 808 pedagogoj patrinlingve edukas 30190 infanojn. Oni ofte aranĝas tradiciajn amuzojn, prezentadojn de amatoraj aktoroj kaj renkontiĝojn de sudslavaj ĥoroj. Jam aperis la unua etnografia kaj folkloro volumo de hungarlandaj sudslavoj; la slava poeto József Gulyás, la postmorta verko de la fama komponisto Tihamér Vujicsics kaj infanfabelo de Milutin Stevanovity estas legeblaj en la lingvoj serba kaj kroata. La sudslavoj havas propran gazeton — *Narodne Novine* — kaj ĉiujare propran kalendaron — *Narodni Kalendar* — kies enhavo atingas altan nivelon kaj movas antaŭen la lingvan kulturon de Hungarlandaj sudslavoj.

\*

Mondkonata estas la punto, kiun en urbo Kiskunhalas kaj en ties ĉirkaŭaĵo la virinoj kroĉetas el tiel minca fadeno, kiel la homa hareto. La prezo de lanugpeza punto — la t. n. halasi csipke — egalas oron. En urbo Kecskemét, en la departementa kultura palaco, oni malfermis ekspozicion de punktoj kun interesa prelego pri la interrilatoj de belartoj kaj popolartoj.

\*

En urbo Vác oni pligrandigos la muzeon Bottyán Vak, kaj tie demonstracios la dokumentojn de la laborista movado. Ankaŭ estos grandigita la muzeo János Arany en urbo Nagykőrös kaj estiĝos loka historia muzeo en la urbo Gödöllő.



Spino-domo en Kazár. Foto de Korniss



Preĝejturo en la subĉiela muzeo, Szentendre

En la departemento Pest, ĉi-jare estiĝos kelkaj muzeoj. La urbon Szentendre oni nomas: „La urbo de historiaj monumentoj kaj belaj artoj”. — Vere la urbo estas inda je la nomo. La direkcio de muzeoj aĉetis domon, kie estos konstanta muzeo por la pentraĵoj, kiujn kreis la pentristo Jenő Barcsay premiita per la premio Kossuth. En la ĉefplaco de la urbo staras la malnova domo de la komercistoj, artobjekta konstruaĵo, kie formiĝos la Salono Szentendre. Ĉi tie estos konstanta ekspozicio el la belartaj kreaĵoj de urbaj belartistoj. Ankaŭ en Szentendre elformiĝos la „Domo de la popularto”, kie estos konstanta ekspozicio el la riĉa folkloro arto.

\*

La angla radio dissendis programon al kelkaj Eŭropaj radiostacioj el la mondfama Royal Festival Hall en Londono, kie la simfonia orkestro de BBC prezentis hungaran vesperon. En la programo rolis la komponaĵoj „Iris” de Sándor Balassa kaj „San Francisko Polyphon” de György Ligeti, fine la opero de Bartók: „La burgo de princo blubarbulo”.

\*

Hungaroton — hungara gramofondisko-entrepreno — gajnis jam la 34-an grandan premion en Parizo okaze de la konkurso de franca Nacia Gramofondiska Akademio. Kvankam en la granda konkurso estis multaj bonkvalitaj prezentoj de Mozarta muziko, tamen la hungara disko ricevis la plej altan premion. La konkursa temo estis la divertimento Es-majora de Mozart, kiun ludis arĉtrio: Dénes Kovács, Géza Németh, Ede Banda.

\*

En Tokio, la japana Estetika Eduka Instituto „Kodály” aranĝis la tradicion jarferman koncerton. En la grandsukcesa koncerto tri ĥoroj prezentis la verkojn de Kodály kaj aliaj hungaraj komponistoj.

Szilárd Bálint

# NI BREMSU PAPERSVARMON!

La neniam kvietiginta diskuto pri la nekontentiga stato de la Esperanta gazetaro pli ol kutime refajriĝis lastatempe pro la interveno en la batalteronon de pluraj fakaj plumoj. Tiun reeksplodon provokis unue „Hungara Vivo”, per serio de tre bonvenaj artikoloj de L. Tárkony, V. Benczik kaj M. Gergely, kiuj, inter la kutimaj, konstantaj jeremiadoj, kelkloke ankaŭ listigas atentindajn rimedproponojn.

En la artikolo de M. Gergely, ekzemple, oni taksas kiel ĉefaj kaŭzoj de la ĝenerale paroknivela aspekto kaj nemontrinda malmoderneco de la plejmultaj (aŭ ĉiuj?) niaj gazetoj, precipe la neprofesian staton kaj nefakan preparon far la koncernaj redaktoroj, plue, la mankon de kunlaboro inter la diversaj gazetoj kaj fine, la troan abundon de la ekzistantaj periodaĵoj, kompare kaj rilate la nombron de la efektiva, potenciala legantaro.

Ci lastan kaŭzon priekzamenas analize ankaŭ G. Kurucz en „Heroldo”. Mi plene konsentas kun li, kiam li asertas, ke, spite la naive fanfaronajn emfazadojn pri nia „plurmiliona samideanaro”, sufiĉe kredinde oni povas taksi la publikan bazon de nia aktiva anaro (kaj sekve de la supozebla abonantaro) je proksimume 40 mil homoj, kio, laŭ la aŭtoro kaj ankaŭ laŭ mi, sendube ne konsistigas sufiĉan grundon, kiu kapablas subteni la 104 nuntempe listigitajn gazetitulojn.

Krome mi ankaŭ samopinias, ke apenaŭ ekzistas komunumo pli soifa je kulturo (kaj je informoj, mi aldonas) ol la nia (la 40 mil homoj ja reprezentas elitajn kremrestaĵojn de la plurcentmiloj da lingvolernintoj, ĉu ne?). Tiu konstato, konsiderinte la mezajn abonombrojn de niaj periodaĵoj, igas la verdan popolon laŭdinda kaj ne riproĉinda, kiel multaj plende opiniis. Riproĉindaj kaj ĉiurimede bremsendaj estas — laŭ la aŭtordeklaro, kiun mi ruĝkrajone subskribas — tiuj svarmantaj ambiciuloj, kiuj hirude invadas la Esperantan preskampojn, plenigante la leterkestojn de ĉiu aktiva movadano, kreante oleomakule ĉiuspecajn presitaĵojn aŭ stencilitaĵojn, tiu amaso da tromemtaksantoj, soifaj je gloro kaj famo gajnebla en nia supozite kvazaŭvirga kampo, tiuj „ŝvelantaj balonoj”, kiuj, fiaskintaj en nacikadraj aktivecoj, sin ĵetas lancopinte en la verdpresan konkurlandon, sin proklamante redaktoroj aŭ ĉefredaktoroj, kaj svingante misie tutan buntaron de la plej heterogenaj standardoj kaj predikante mesaĝojn la plej kurozajn kaj de neniu bezonatajn.

Alipunkte en la artikolo, Kurucz igis min korekti je 180 gradoj mian starpunkton rilate la landmovadajn gazetojn — nome, li konvinkis min pri la nepra dezirindeco, ke naciaj revuoj sin adresu inform-kaj-propagandcele al samlingvanoj „en la nacia lingvo” (kial sin izoli intence disde la vastaj popolamasoj per uzo de Esperanto?), kaj lasu la peresperantan informadon kaj klerigon al la tiucelaj internaciaj organoj.

Nur se ni sukcesos draste limigi tiun enorman mal-

ŝparon de papero, fortoj, intelektoj (kelkfoje) kaj, ĉefe, tiun rabadon de mono el la malŝvelaj poŝoj de miloj da (naive) bonvolaj movadanoj — fortoj kaj mono, kiuj povus esti adresitaj kaj sume koncentritaj pli profite al kelkdekoj (maksimume) da vere necesaj, aperigindaj revuoj —, nur se la landmovadaj gazetoj sin limigos al nacilingva kaj nacikadra informado kaj ekstera propagando, nur tiam kaj tiamaniere ni tre verŝajne kaj finfine povos vante fieri pri posedo de unu dignaspekta, regule aperanta, multpaĝa oficiala gazeto („Esperanto”), unu semajna, ok- aŭ dekpaĝa (kolora?), riĉe farĉita magazino („Heroldo”), unu arte altnivela, dokumentita kaj ilustrita literatura revuo („Hungara Vivo”) kaj dekduo (ĉirkaŭ) da firme memstaraj, science senriproĉaj, fakaj organoj.

Konklude: ĉe mi proverbo laŭtas tiele: „En ĉiu fako nur restu ĉio ĉe specialistoj de l’ profesio”. Sekve: ni bremsu senmizerikorde paper- kaj ambicisvarmon de la tromultaj netaŭgaj diletantoj! Ni ŝparu niajn nesentimajn fortojn kaj ilin koncentru en malmultajn, meritindajn iniciatojn! Kaj aplombuloj retroiru, memrezigne aŭ perforte, al terplugado!

Aldo di Giorgi, Italio

---

## Kara samideano ĉefredaktoro!

Uzante la favoran okazon, mi esprimas al Vi kaj al ĉiuj viaj helpantoj en la redakcio mian plej varmegan dankon pro la alta nivelo de „Hungara Vivo”. Ĝi estas periodaĵo, kies nura montro al neesperantistoj vekas intereson kaj estimon. Oni povas per „HV” propagandi Esperanton, eĉ se la propagandatoj ne scias eĉ vorteton Esperantan. Kaj se tiu admirinda revuo trafas en la manojn de esperantisto, tio signifas, ke li restos ĝia konstanta amiko. Dank’ al „HV” mi nun tre multe scias pri Hungario, mirakla malgranda lando, kun granda animo kaj grandaj agoj. Dank’ al „HV” mi kontaktas kun Esperanta kulturo, mi havas eblon senĉese legi verkojn de niaj klasikuloj, dank’ al „HV” mi ricevas plej altajn modelojn de bonstila Esperanta lingvo. Nu, kurtadire — por mi „HV” estas trezoro, kian ne sukcesis superi aliaj esperantistoj el „grandaj” nacioj. Pruviĝas refoje, ke grandecon de nacio konsistigas ne granda nombro da loĝantoj, sed kvalito de iliaj cerboj. Kun plej profunda estimo kaj amikaj sentoj.

Romano Grinŝpan, Sovetunio, Taŝkento.



# ENHAVTABELO

de Hungara Vivo 1971—1975

La enhavtabelo de Hungara Vivo por la jaroj 1961—1970 aperis en la 1971/2—3. n-roj de nia revuo. Nun alvenis la tempo pretigi la enhavliston por la jaroj 1971—1975. — Ankaŭ nun ni faris simpligojn. Kelkloke ni ŝanĝis la titolon de la artikolo, por ke la legantoj ricevu informon pri la enhavo jam laŭ la titolo. Multfoje ni mallongigis la titolon pro la deviga ŝparado. La nomoj de la tradukantoj estas kompostitaj per kursivaj literoj en parentezo.

## Numeroj kun difinita karaktero

1971/3 Kálmán Kalocsay  
1972/4 Literatura Mondo  
1973/1 Sándor Petőfi  
1973/2 Gyula Illyés  
1973/3 Budapeŝto  
1973/4 Sándor Szathmári  
1974/1 Originala Esperanta prozo  
1974/2 Hungario kaj la turismo  
1974/3 Originala Esperanta poezio  
1974/4 La hungara ekonomio  
1974/5 Originala Esperanta dramo  
1974/6 La hungara scienco  
1975/2 La liberiĝo de Hungario  
1975/3 La Esperanta gazetaro  
1975/4 Mór Jókai  
1975/5 Ferenc Szilágyi  
1975/6 Lajos Tárkony

## TRADUKITA PROZO

Bárány Tamás: Vetero senkompata. (Ujlaki—Nagy Tibor) 75/1.  
Barta H. Lajos: Kiu scias hungare. (Tárkony) 73/4. — Historietoj kaj historio. (Kökény) 74/2.  
Benedek Elek: La kaproungoj en Balaton. (Nyitray Krisztina) 73/3.  
Csurka István: Ŝakretisto. (Wacha Balázs) 75/3.  
Déry Tibor: Remi-Romeo. (Tárkony) 73/1. — Amo. (Kalocsay) 74/5.  
Fábián Zoltán: Historio de sepdek kvin sekundoj. (Kökény) 72/3.  
Gábor Miklós: Per plumo. Notoj de taglibro. (Kökény) 74/1.  
Galambos Lajos: Mono. (Kalocsay) 71/4.  
Gergely Mihály: La sonĝo de akvodukto-muntisto. 74/4.  
Gorin Gr.: Kial la bandaĝo estas sur la piedo? (Filippov) 71/1.  
Gyárfás Miklós: Popolfabeloj. (Tóth János) 73/4.  
Illés Endre: Inter vorticoj. (Fejes Márton) 75/2.  
Illyés Gyula: Sándor Petőfi. (Mátéffy József) 73/2. — La popolo de la „Puszta”. (Fenyvesi Ervin) 73/2.  
Jókai Mór: Kie la mono ne estas Dio. (Enkonduko). — La aĥemenidiono. (Tárkony) 75/5.  
Karinthy Ferenc: Bösendorfer. (Kalocsay) 72/2.  
Karinthy Frigyes: Mahlzeit kaj Zaturek. (Nagy István) 74/2. — Prelego. (Fejes) 75/1.

Kristóf Attila: Sciencfikcia situacio. (Kalocsay) 74/3.  
Kosztolányi Dezső: Anĝelo. (Obermayer Klára) 72/1.  
Lengyel József: Kolomboj. (Golden Éva kaj Bernard) 74/1.  
Mikes György: Bibliotek-ordigado. (Kalocsay) 72/2. — Infanbuŝo. (gng) 72/2.  
Moldova György: La filino de la pordisto. (Kalocsay) 72/4. — Niaj unuaj ludiloj. (Golden Éva kaj Bernard) 74/2.  
Molnár Géza: Ŝanoar. (Szathmári) 71/2.  
Molnár Zoltán: Böce. — Voĉo. (Bálint Szilárd) 73/2.  
Nagy Lajos: La sentalenta verkisto. (Nyitrai) 71/3.  
Örkény István: La homo sopiras varmecon. (Dévai János) 71/1. — Ĉu estas arboj en Venecio? (Faragó Mária) 74/2. — Ni lernu fremdajn lingvojn. (M. F.) 75/2.  
Petőfi Sándor: El lia Taglibro. (Nyitray) 73/1.  
Ráth—Végh István: La netuŝebla verdikto. (Kalocsay) 73/4.  
Szakonyi Károly: Je la sepa horo. (Oberding László) 73/3.  
Szántó Ferenc: Ni estis multope. (Kun Lenke) 75/1.  
Szilárd Leó: Raporto el la centra Stacidomo. (Benczik) 73/3.  
Tarján Ida: La recepto. 73/1. — Patrinoj kaj infanoj. 73/2.  
Tóth—Máthé Miklós: Lingvokurso. (Fejes) 74/5.  
La stulta junulo. El kolekto de Gy. Ortutay. (Balkányi) 74/2.  
Du hungaraj popolfabeloj: Katrinjo Kádár — La murdita fraŭlo. (Kalocsay) 74/2.

## ORIGINALA PROZO

Abonyi Nagy Árpád: Iam mi havis ĉevalon. 73/3.  
Baghy Gyula: El liaj artikoloj. 71/4.  
Bálint Szilárd: La konsiderema edziĝonto. 71/2. — Tri mirakloj de Sankta Antonio. 72/1. — Alibio. 73/4.  
Benczik Vilmos: Vespero sur la ponto. 72/3.  
Csiszár Ada: Tragikomedioj. 73/1. — „Egalrajteco”. 73/2.  
Francis: La Turniro. 74/6.  
Reto Rossetti: Paŭlo Pease. 75/3.  
Schwartz Raymond: Laŭ mia ridpunkto. 75/1.  
Szathmári Sándor: Honorigo — Urania (Du noveloj) 73/4.  
Szilágyi Ferenc: Markizo Rabarba en verdo. 75/5. — Tiel okazis aŭ Mistero Minora. 75/5.

## ESEOJ

Auld William: Esperantaj romanoj. 74/1. — Kiel mi amikiĝis kun Imre, Sándor, Mihály, k. a. 74/4. — Skizo pri la evoluo de la poezia lingvaĵo. 74/3. — Originalaj dramoj en Esperanto. 74/5.  
Benczik Vilmos: Pensoj pri la Esperanta literaturo. 71/1. — Pri la taskoj kaj rolo de la Esperanta litera-

turo. 72/3. kaj 74/1. — La proza stilo en Esperanto. 74/1. — Kien la poezio? 74/3. — Esperanta liriko en Hungarlando. 74/3. — Literaturlegado en fremda lingvo. 74/4. — Nova rikolto. Pensoj pri la originala poezio post la Esperanta Antologio. 74/3. *Kalocsay*: Kion fari por la E-a literaturo? 71/3. — La Esperanta novelo. 74/1. *Ojalo Jaan* La tragedio de l' homo en Estonio. 72/3. *Régulo Pérez Juan*: Poezio kaj eldonisto. 74/3. *Verloren van Themaat*: Ĉu vivas nia liriko? 74/3. *Vigh Gábor*: Penso-eroj pri la Esperanta liriko. 74/3. — Por la bono de la Esperanta literaturo. 74/1.

### TRADUKITA POEZIO

*Bari Károly*: Migras ciganoj. (*Kalocsay*) 71/3. *Baudelaire*: La morto de l' artistoj. (*Tárkony*) 75/6. *Benjamin László*: Socialistoj. 74/4. — Mi volis fajron. 75/2. (*Kalocsay*) *Buzás Andor*: Mia vivo. (*Rados*) 72/3. *Csokonai Vitéz Mihály*: Al la espero. — Al rozburgono. (*Kalocsay*) 74/1. *Füst Milán*: Maljuneco. (*Kalocsay*) 74/1. *Garai Gábor*: Mia plezur' kaj mia turmento, Budapeŝt'. 73/3. — Kontraŭ la fluo. 74/4. (*Kalocsay*) *Holló Ernő*: Du poemoj. (*Kalocsay*) 73/4. *Illyés Gyula*: Sur la bordo de Kharono. — Bartók. (*Kalocsay*) 73/2. — En la flava domo. (*Szondi György*) 74/5. — Iras la plugil. (*Fejes*) 75/2. — Danke (*Kalocsay*) 75/6. *Janus Pannonius*: Du poemoj. (*Kalocsay*) 72/3. *Jékely Zoltán*: Pro l' pens'. (*Kalocsay*) 75/6. *Jobbágy Károly*: Du poemoj. (*Rados*) 71/2. *József Attila*: Kun pura koro. — Kanto de junedzinoj. (*Kalocsay*) 75/3. — Saluto al T. Mann. (*Tárkony*) 75/6. *Kassák Lajos*: Laborist-portreto. 75/4. — Vojoj senfinaj. 75/5. (*Kalocsay*) *Kalevala*-detalo, la originala; kaj la E-traduko de *Lep-päkoski*. 71/1. *Kalevipoeg*-detalo, la originala; kaj la E-teksto de *H. Dresen*. 71/1. *Kónya Lajos*: Kvar poemoj. (*Kalocsay*) 71/1. *Kosztolányi Dezső*: Virinoj. (*Kalocsay*) 75/6. *Kuczka Péter*: Domoj, stratoj, placoj. (*Fejes*) 73/3. *Ladányi Mihály*: Tri poemoj. 71/2. — Sen ekstazo. 73/3. — Li trairis inter la soluloj de l' kafejo. 75/4. (*Kalocsay*) *Martinov*: Marto. (*Hoveš*) 75/1. *Michelangelo*: Soneto. (*Tárkony*) 75/3. *Pákolitz István*: Sireno. (*Fejes*) 75/3. *Pardi Anna*: Kvin poemoj. (*Kalocsay*) 72/2. *Petőfi Sándor*: Tri poemoj. — Al arboj flustras trista vent'. (*Kalocsay*) 73/1. *Sipos Gyula*: Du poemoj. 72/2. — Oni min rekonos. 75/2. (*Fejes*) *Tamkó Sirató Károly*: Vagabondo Paŭlo. (*Rados*) 71/4. *Váci Mihály*: Sen titolo. (*Kalocsay*) 71/2. *Vajda János*: En la arbaro Val-a. (*Szilágyi*) 75/5. *Vihar Béla*: Budapeŝt: Eŭropo. (*Kalocsay*) 73/3. *Weöres Sándor*: Du poemoj. (*Kalocsay*) 72/4. *Zelk Zoltán*: Sinjorinoj en kafejo. (*Fejes*) 72/4. — Epitafio. — Naŭ versoj pri feliĉa hororo. (*Fejes*) 75/6.

### ORIGINALA POEZIO

*Aldo de Giorgi*: La lasta rozo. — La protagonisto. 75/2. — Viaj manoj. 75/3. *Auld William*: Kvar poemoj el lia Poemaro „Humoroj”. 71/4. — Bonvolo sufiĉas. 74/3.

*Baranyai Imre*: En sonĝo. 75/2. — Primavera. 75/5. *Baupierre*: Demandoj. 75/6. *Francis*: La kosmo. 74/6. *Goodheir A.*: El la „Nordaj Strofoj”. 74/5. *Hlavathy Attila*: Pseŭda psalm'. 72/3. *Jevsejeva Ludmila*: Al Tárkony. 74/3. *Kalocsay Kálmán*: Strofoj el „Kalendaro”. 74/3. — En ĉi murdepoko. 75/1. *Kock Edwin*: Soneto. 74/3. — Kadukiĝo. 75/1. *Mattos Geraldo*: 101. — 74/3. *Miyamoto Masao*: Kun la aŭtoro de hirundlibro. 74/3. *Ponori Thewrewk Aurél*: Tri poemoj. 71/4. *Ragnarsson*: La kondamnitoj. 74/3. — Paŝoj. 74/4. *Rajczi Rezső*: Teatro. 74/3. *Rossetti Reto*: Aŭtoritatulo. 74/3. — La vivomaro. — Nacia lingvo. 75/3. *Sadler*: Pledo. 73/3. *Tárkony Lajos*: Kvar „Tririmoj”. 72/2. — Mia Budapeŝto. 73/3. — Portreto. 74/1. — Kvar sezonoj en 1919. 74/3. — Mia fratino. — La spegulo. — Petunio. — Mozart inter la arboj. — En hospital-fenestro. 75/6. *Urbanová Eli*: Renkonti vin. 73/1. — Ne multe mankis. 74/2. En prozo: *Rossetti Reto*: Responde al Edwin Kock. 74/6.

### DRAMOJ

*Baghy Gyula*: Sonĝe sub pomarbo. Fragmento. 75/1. — Kompara analizo de liaj tri dramoj. (*Rados*) 75/1. *Boulton Marjorie*: Kelkaj pensoj pri dramverkado. 74/5. *Tóth Endre*: Kristnaska saluto. Radioludo. 74/5. *E. I.*: Senregula recenzo pri la dramo „Doktoro Rosales”. 75/1.

### PRI VERKISTOJ, GVIDANTOJ DE LA MOVADO

*Baghy Julio* 71/4 (*Benczik*) — La inaŭguro de lia tomboŝtono. 74/5. (*Bálint*) *Béikányi Pál* 74/2 (*Mátéffy*) *Baranyai Imre* 72/1 (*Szathmári*) — 75/5 (*Kökény*) *Bárczi Géza* 74/1 (*Pechan*) — 75/6. (*Gergely*) *Bata József* 71/2 (*Pelčo Nikola, Vildebrand, Schödl*) *Boharev* 71/4 (E. A.) *Francis John*, „la sobra intelekto”. 74/6 (*Auld*) *Gergely Mihály* 75/2 (*Tasnádi*:) Bildoj por la naskoloko. *Hohlov Nikolao*: La Tajdo. — 75/6. (*Tárkony*) *Jonas Franz* 74/3. *Kalocsay Kálmán* 71/3 (*Lapenna* — *Auld* — *Regulo* — *Tárkony*) *Kökény Lajos* 72/3 (*Benczik*) *Korach Mór*. 75/6. (*Gergely*) *Kutas Imre* 73/4 (*Szenes*) *Lapenna Ivo*. 71/4 (*Vigh*) *Lesznai Lajos* 71/1 kaj 75/4. *Nowak Alina*. 71/3 (*J. Kerek*) *Pechan Alfonz* 73/4 (*Csiszár Ada*) *Pumpro Tomas* 73/1 (*Kalocsay*) *Rossetti Reto*. 75/3 (*Auld*) *Seper Kajetán*: 73/4 (*Pechan*) *Somlai László*. 71/3 (*Pechan*) *Szathmári Sándor* 73/4 (*Benczik*), 74/5 kaj 74/6. (*Benczik*) *Szilágyi Ferenc* 75/5: Ferenc Szilágyi, la pseŭdo-filistro (*Benczik*) — Memore al F. Sz. *Auld*. — F. Sz. en Esperantujo. (*Ragnarsson, Bertram Potts kaj Minnaja*) — El la verkaro de F. Sz. — bibliografio. (*Takács I.*) — La ĉiomflankulo Sz... (*Kalocsay*) Vivraporto — poemo de F. *Szilágyi*.

pettyn (interparolo kun li). 75/4. (Fejes)

Ungár Imre. 75/4

Tárkony Lajos. 72/2 (Benczik) — (Kalocsay:) La „Okcidento de Tárkony”. — Mozaiko Pri T. (Drago Krajl, Kalocsay, Balkányi, Vatré, Ragnarsson, Thorsen, Carlevaro). Bukedo de la redakcio (Ada Csiszár, Gergely, I. László, Lesznai.) *Maria Benczik*: Bibliografieto pri la verkaro de L. T. 75/6

### PRI HUNGARAJ VERKISTOJ, POETOJ

Illyés Gyula sepdekjara. 11 salutoj. (Ujlaky) 73/2.

Madách Imre. Lia alia dramo: Moseo. (Balkányi) 73/3.

Németh László. — En la servo de Tolstoj. — (E. Farkas) 71/1.

Petőfi Sándor. La ekzemplo de P.: *Simon István*. (V. K.) — P. eksterlande: Fejes. — Libero kaj Amo de P.: Vatré. — P. en Esperanto: Benczik. — La grafo de P.: Balkányi. — Ĉiuj en 73/1. — Jubilea datreveno de P. en Estonio: *Haabrere*. 73/2.

Jókai Mór. — *Varga—Haszonits Zsuzsa*: Mór Jókai; Varia paĝo pri Jókai — La Jókai kometo: *Emil Kolozsvári-Grandpierre*. (Fenyvesi) — Endre Ady pri Jókai. (István László) — Mondlingvo de Jókai: *Tivia*. — Volapuka lando de Siberio: — *jes*. La humuro de Jókai. (Balkányi) ĉiuj en 75/4.

En la partoj „Tradukita poezio” kaj „Tradukita prozo” artikoletoj pri h. poetoj kaj verkistoj.

### LIBROJ, RECENZOJ, GAZETOJ

Apitz: Nuda inter lupoj. 74/6.

Auld: Paŝoj al plena posedo. 71/2.

Bécquer: Kun sopira koro. (Diego) Rec. Benczik. 73/3.

Benczik: E-aj libroj el H-lando. 75/2. — Kvin recenzoj: Antologio de amoro — Skota legendaro. — Lapenna: Por pli efika informado. — La vojo al Nirvano. — Antaŭen al laboro. 74/6.

Bezruc: Sileziaj kantoj. Rec. Fenyvesi. 71/4.

Capek: Libro de apokrifoj (gng) 72/3.

Dévai János: Sveda gasto en nia librovendejo. 72/1.

Fejes Márton: Jardekoj en la servo de la h. kulturo. (Pri la agado de Tibor Demeter). 73/2.

Forge: Saltego trans jarmiloj. Rec. Benczik. 74/1.

Gárdonyi: Sklavoj de l' Dio. (Hamvai János). Rec. Balkányi. 72/4.

Kock Edwin: Kvin elementoj. Rec. Fenyvesi. 71/2.

Kökény: Konversaciu en E. (Ada Csiszár) 73/2.

Lapenna: Retoriko. 71/4.

Lapenna: Perspektivoj... „Diamanta libro de la E-a Movado”. Rec. Benczik. 75/3.

Marin vizitas sian hejmon — la mondon. Red. Givoje. 74/4.

Mazurovič: La morto de Smail agao Ĉengiĉ. Rec. Kalocsay. 73/2.

Migliorini: E-a legolibro. 72/4.

Orienta kolektaĵo de la H. Scienca Akademio. Rieth. 73/4.

Pelé. Mi estas... Rec. Ujlaky. 72/3.

Prešern: Girlando da sonetoj. (Velebit) Rec. V. B. 74/1.

Promet: Kuŝanta figro. (my) 73/1.

Rakuša: Testamento de forpasinta aktivulo. Rados. 72/3.

Sadler: Memkritiko. Rec. Benczik. 72/1.

Shakespeare: La ŝempesto. (Kalocsay) 72/3. Rec. Ada Csiszár.

Szerdahelyi: Int. Lernolibro 73/2. Rec. K. L.

Sullivan: Tri verkoj. Rec. Benczik. 75/5.

Ujlaky: La sporta lingvo en E. Rec. Ro—Lo

Vadas: Scienca verko kun E-a resumo. Rec. Fenyvesi. 73/4.

Waringhien: Ni kaj ĝi. — Eseoj III. Pri religio kaj arto. Rec. Kalocsay. 75/4.

Woolf: English Phrases and Expressions in E. Rec. Ada Csiszár. 72/1.

E-aj libroj el H-lando. 75/2.

La Babelo de la Scienco. 74/4.

Bálint: La h. lipografio estas 500-jara. 73/3.

La naciaj malplimultoj en VDR. 73/3.

Benczik: Eszperantó Magazin aperas monate. 73/3. — Pensoj pri la E-a gazetaro. 75/3.

Gergely: Faktoj kaj ebloj de nia gazetaro. 75/3.

Givoje: Enketo de Hungara Vivo. 75/5.

Kalocsay: Kelko pri la starto de Literatura Mondo 75/3.

K. L. Hungara Fervoĵista Mondo. 73/2.

Kurucz: La lernantaro bezonas legajon. 72/1. — Juna Amiko kaj la lernantaro. 73/2.

Revuo de Revuoj — en ĉiuj numeroj. Tárkony.

Rieth: Eszperantó Magazin — nia surstrata propagandilo. 75/2. — Hungara Vivo — kiel la legantoj ĝin taksas. 75/3.

Szenes: La centjara „Népszava”. 73/2.

Varga—Haszonits: Literatura Foiro. 71/1.

Enketo de redaktoroj... 75/3, 4.

Opinioj pri Eszperantó Magazin. 75/3.

Rieth: Fondiĝo de Budapeŝta Arkivo. 75/2.

### LINGVO — TRADUKARTO

Balkányi: Kiam la hungara lingvo fariĝis oficiala ŝtatlíngvo? 73/4. — 1975. Int. Finn-Ugra Kongreso en Budapeŝt. 73/2.

Eörsi István: El la taglibro de la tradukartisto. (K. K.) 74/2.

Eta: Sur la benko de akuzatoj. („Strangaj virinaj nomoj”) 71/1.

Fekete Gyula: Gepatra lingvo de la egalrajteco. 74/1.

Fenyvesi: Slipara vortaro. 71/3.

Gyarmathy Zsolt: Sekretoj de virinaj nomoj. 72/1. — Johano Bolyai kaj la lingvo. 73/3.

Kalocsay: Plena Il. Vortaro de E. 71/2. — Diskutado pri la apostrofekstermo. 71/3. — Lingvo kaj logiko. (Recenzo de Lernolibro de Mimó). 74/5, 75/1. — Vortfarado. 75/3.

Kulagin: Konferenco en Moskvo pri la lingvo de int. komunikado. 73/2.

Münnich Antal: Komputado kaj l' estonto de l' Int. Lingvo. 71/1, 2.

Pechan: Antaŭ dulingva aŭskultantaro. 71/3.

Radó György: Pri la E-a tradukarto en la finn-ugra kongreso. (Mátéffy) 71/1.

Szenes Imre: Kiu bone scias arablingve. 72/2.

Seppik: La Tuta Esperanto. (gng) 72/4.

Szerdahelyi: E. en la spegulo de la moderna lingvoscienco. 74/2, 75/1.

Tóth János: Kiel lerni lingvojn? 71/1.

Ujlaky: „La sporta lingvo en E.” (Ro—Lo)

Vigh Gábor: Publika letero al Usona profesoro. 71/1.

Vilborg: La partcipa demando en la Akademio. Rec. Kalocsay 75/2.

Kiel oni parolas hungare — en Ameriko. 72/3.

Cu ni estas malfacilaj? (Hungara Vivo) 72/4.

V. B. Kunveno de esperantistaj tradukistoj. 74/4.

El la mondo de la lingvoj. (Ujlaky) 73/4.

### ARTOJ

Mátéffy: Islama arkitekturo en Hungario. 72/1. — Kelke da elstaraj arkitekturaj restaĵoj en Budapeŝto. 73/3. — Eŭropo-premio por la hungara artmonument-prolektio. 75/5.

La artobjekto-ŝirmado kompensiĝas. 72/4.  
 Mezepokaj arttrezoroj en la tero. 74/6.  
 Gergely, Mihály: Balássy, Zoltán. 73/1. — Barta, István. 72/2. — Borsos, Miklós. 73/2. — Farkas Aladár. 72/2. — Feledy, Gyula. 71/4. — Gross, Arnold. 71/1. — Kovács, Margit. 73/4. — Lenkey, Zoltán. 72/1. — Lukács, Ágnes. 72/2. — Nalipa, István Pál. 72/2. — Orosz, János. 75/1. — Reich, Károly. 71/2. — Rékássy, Csaba. 72/3. — Somogyi, József. 72/4. — Váli, Zoltán. 72/2. — Varsányi, Pál. 72/2.  
 Bálint Szilárd: Historio de Budapeŝta statuo. 73/3.  
 Fehér Zsuzsa: Szalay, Lajos. 73/1.  
 Rados Péter: Ekskurso al la Belarta Muzeo. 74/2.  
 Hungara ekspozicio de avangardo en München 72/4.  
 Sukcesoj de la hungara ceramiko. (Rieth) 73/4.  
 Gergely: Int. exlibris kongreso en Budapeŝto. 71/1.  
 Lesznai Lajos: La tragedio de l' Homo — opero. 71/2. — Kapitroj en la h. muzikhistorio. 71/4, 72/2, 72/3, 72/4. — Budapeŝto — muzikurbo. 72/1. — Int. famo de la h. gramofon-diskoj. 73/1. — Muzika vivo. 73/2. — Budapeŝtaj stratoj rakontas muzikhistorion. 73/3. — E. kaj la muziko. 73/4. — Pri la mondfamo de la h. ĥoroj. 74/1. — Socio kaj muzika kulturo. 74/5. — Muzikscienco en Hungario. 74/6. — Hungario — muziklando. 75/2. — Vivo por Bartók (ankaŭ pri Denijs Dille). 75/3. — Kodály-Instituto en Hungario. 75/6.  
 Kolekton de reproduktaĵoj en ĉiun departementon! (Ujlaky) 71/2.  
 Plena eldono de la Bartók-verkaro. (L. K.) 71/2.  
 Pechan: H. orkestroj en Ameriko. 74/3.  
 László István: La junaj ambasadoroj de nia muzikkulturo. 75/5.  
 Fondumo por memoro de Bartók. 74/4.  
 Ōsz Gabriella: H. Ŝtata Pupteatro en Zagreb. 72/2. — Unikaj kontaktoj inter la h. kaj eksterlandaj teatroj. 73/1.  
 Rados Péter: Pri la Budapeŝta teatro Thalia. 73/3.  
 P. B.: Filmoj pri Hungarlando. 72/1.  
 Lapenna Emilja: Nova teatro. 74/5.  
 Bánd Anna: Esperanta Pupteatro. (István Kovács) 74/1.  
 Avar Pál, KVK: Teatra Kroniko. 71/1, 2  
 Kalocsay: Bar-Koĥba Ludo. 71/4. — Zanzo. 72/3.

## HISTORIO, POLITIKO, PACO

La Komuno de Parizo centjara. Fenyvesi. 71/4.  
 Konfeso pri la patrio. Szenes Sándor. (Mátéffy) 71/1.  
 Sámuel... la unika antaŭhomo. Jáki Ferenc. 72/3.  
 Dózsa. Milito de kamparanoj. Fenyvesi. 72/4.  
 Religieco en Hungarlando. Fenyvesi. 73/1.  
 Hungario en la spegulo de la mondekonomio. (Rieth) 73/4.  
 La virina egalrajteco per okuloj de kuracistoj. Avar Pál—Szabó Mária Rózsa. 74/1.  
 La amika renkontiĝo de naciaj literaturoj. Balkányi 74/2.  
 Diplomatoj de la hungara kulturo kaj scienco. 74/2.  
 Pri la hungara konstitucio. Matéffy. 74/4.  
 Pri nia ekonomio. Szabó József. (Cseh J.) 74/4.  
 Nia eksterland-komerca bilanco estas pozitiva. 74/4.  
 Hungario kaj la Konsilio de Reciproka Ekonomia Hel-po. László István. 74/4.  
 Industrien provincen! Haszpra Ottó. 74/4.  
 La angla gazetaro pri la hungara reĝa krono. §1/3.  
 La hungara socialisma agrikulturo. 74/4.  
 Hungaroj en Azio László Bencsik Sándor (Val. Szabó) 71/2.

Hungardevenaj araboj en Nubio. Balkányi. 74/4.  
 Pri la Prezidia Konsilio de la Hungara Popolrespubliko. Matéffy. 75/1.  
 Hungara aventurulo — Madagaskara reĝo. Balkányi. 75/1.  
 Kalendaro. Rieth. 75/2, 4, 5.  
 Gergely: 1945—1975. Nia historio laŭ konfeso de malnovaj fotoj. Balado de la milito, (paco, laboro). 75/1, 2, 4.  
 La kultura stato de la naciaj minoritatoj. Matéffy. 75/2.  
 Kiel laboras la Mondasocio de Hungaroj? László István. 75/2.  
 Interesaj notoj el la gastlibro de la Mondasocio de Hungaroj. László István. 75/5.  
 Elstara patrioto kaj revoluciulo Mihály Károlyi. (Fenyvesi) 75/3.  
 Szabó-Felső Flóra: Internacia jaro de Virinoj. 75/6.  
 Valev Kunčo: Proverboj pri la virinoj. 75/6.

## URBOJ, LANDOJ, REGIONOJ

Hungario — kiel niaj legantoj vidas. 72/1.  
 Hungarlando gastigas la 1-an ĉasistan ekspozicion. (Ujlaky) 72/1.  
 Turismo en Hungarujo. Bencsik. 74/2.  
 y: Nova vivo sur la h. stepo. 74/2.  
 Rezervado de akvo en Hungario. László Ferenc. (Pechan) 75/5. — Ĉirkaŭajprotekto kaj akvomastrumado en Hungario. (Pechan.) 74/1.  
 Budapeŝto jubileas. Matéffy. 72/3.  
 Deklaro de gvidantoj de 29 Eŭropaj ĉefurboj en Budapeŝto. 73/1.  
 La loksidiĝoj de Budapeŝto dum 2000 jaroj. Kökény. 73/3.  
 Budapeŝto urbo centjara — urbo dumiljara. Szabó Mária Rózsa. 72/1.  
 Konstanta Danub-ekspozicio en la budapeŝta Citadelo. László. (Ujlaky) 73/3.  
 Japano en Budapeŝto. Hukaja Sitoŝi. 73/3.  
 Budapeŝto — sur paĝoj de „Panoramo”. 73/3.  
 Balatono — nia granda trezoro. László 74/2.  
 Krom Balatono nia plej granda lago estas Velence. László. (Ujlaky) 74/6.  
 Esztergom 1000-jara. Matéffy. 74/1.  
 La infanurbo en Fót — 18-jara. Bálint. 75/5.  
 Kisköre — La akvonodo de... Dóra-Haszpra. 72/3.  
 Pécs. Tófalvi Éva. 72/2.  
 Székesfehérvár. Kökény. 72/2.  
 Szolnok, urbo de la H-landa E-Kongreso. 74/2.  
 Niaj landaj zorgoj. Kv̄k. 72/1.  
 Vintra vojaĝo (en Transdanubio). Kökény. 74/2.  
 Esperanto kaj turismo. Pallós Erzsébet. 74/2.  
 La naci-malplimulto en H-lando. 74/2.  
 Interparolo kun Gy. Ortutay pri la h. folklor-esploroj. Kiss Károly. (Kvk.) 74/2.  
 Urbo sub tendo. Pechan. 74/2.  
 Grekoj en H-lando. 74/2.  
 Kiu estis la sennoma verkisto? PB. 74/3.  
 Pallós Elizabeta: 26-a H. E-Kongreso en Komló. 75/6.

## BAZAJ SCIENCAJ ARTIKOLOJ

Gábor: Pri la taskoj de la scienco. (Fejes) 72/3.  
 Szentgyörgyi: Por scienculo nur optimismo estas akceptebla. (Rieth) 72/3.

*Jánossy Lajos*: Pri la scienco. 72/3. (*László István*)  
*László István*: Vizito en la Atomkern-esplora Instituto en Debrecen. 73/2.  
*Balkányi*: Sur la spuroj de genia esploristo. 74/3.  
*Máthé Árpád*: Hungaraj scienculoj. 74/6.  
*Szentgyörgyi*: Televida intervjuo. (*László István*) 74/6.  
 H. O. Sciencaj komunikaĵoj — rezulto de persista laboro. 75/5.  
 Intervjuo kun prof. Straub, ĉefdirektoro de Biologia Centro. *Tóth János*. 71/3.

### KOMUNIKADO, KOMERCO

*Patrubány I.*: Pasaĝera komforto kaj sekureco. (*Kris-tek*) 72/1.  
*Bácskai*: La Metro de Budapeŝto jam trafikis sub Danubo. 73/1.  
*Balkányi*: La malnovaj foiroj en la h. ĉefurbo. 75/1. — Nova h. muzeo de trafiko. 74/4.  
*Csiszár Ada*: Multe da mono — ne ĉiam bono. 75/1.

### NATURO, SANITARO

Amatorastronomio en H-io. *Kulin György*. 71/3. (*Ponori Thewrewk*)  
 La perspektivoj de la veter-fabrikado. *Szondi György*. 71/3.  
*Coffea Arabica*. *Csiszár Ada*. 72/2.  
 Ĉu ekzistos vivo post la naskiĝo? *Szent-Györgyi*. 72/2.  
 Tajdo en karsto. *Gárdos Miklós*. 73/3.  
 Subteraj mirakloj de la naturo? *Magyari Gábor*. 74/2. (*Fejes*)  
 Utiligo de niaj termo-akvoj helpe de U. N. *László István*. 74/6.  
 Filmo pri la „stress” kaj ties scienculo. *P. B.* 71/1.  
 Por pura aero. *Máthé*. 73/1.  
 La verŝajna kuracmetodo de la kancero. *Szent-Györgyi*. 73/2.  
 Anatomio de la grasiĝo. (*Fenyvesi*) 73/4.  
 Interesaĵoj. — *Kvk.* 73/4.  
 Medicinhistoria Muzeo en Budapeŝt. 73/4.  
 Subĉieletnografia muzeo en Göcsej. *Csiszár Ada*. 73/4.  
 Dudekjara la Pionira Domo en Pécs. *Balkányi*. 74/5.  
 Kultura plano de la fergisa brigado... (*V. B.*) 74/6.  
 Forumoj por la junularo. *Tóth János*. 71/4.

### S P O R T O

*Ujlaky*: Sporto 71/1, 2, 4. — Post Munkeno 72/4. — La Sporta lingvo en Esperanto.

### TEKNIKO, MATEMATIKO ktp.

*Bácskai*: Intervjuo kun la nova prezidanto de UIC, K. Rödönyi. 71/2.  
*Csiszár Ada*: Koloroj. 71/4.  
*László István*: *Kandó Kálmán* 71/2. — *Jedlik Ányos* 71/3. — *Bánki Donát* 72/1. (H. pioniroj de la tekniko.)  
*Nagy Károly*: Aluminio, la hungara arĝento. 72/4.  
*P. B.*: Komenius. 71/1.  
*Tóth János*: Kandidateco antaŭ diplomo. 71/1.  
 Esplorado kaj produktado de izotopoj. 72/4.  
 Kvinent h. fakuloj en 46 landoj. 73/1.  
 Fakingstruado de eksterlandaj teknikistoj en Budapeŝto. 73/1.  
 Plasto-kemio en la ledo-produktado. 71/2.

### ESPERANTO-MOVADO KAJ HISTORIO

*Gergely*: Hungara Vivo estas dekjara. 71/1.  
*Kökény*: Esperanto en Hungario, 1950—1960. — 71/1.  
*Szerdahelyi*: Progresiva paŝo en nia movada historio. 71/1.  
*Vigh Gábor*: Publika letero al usona profesoro. 71/1.  
 Najbareco, amikeco. 71/1, 4.  
*Kökény*: Enhavtabelo de Hungara Vivo 1961—1970. — 71/2, 3.  
 Vizito ĉe la 3-a TEK en Pécs. 71/3.  
 Esperanto-Semajnoj en Hungario. 71/3.  
*Varga-Haszonits Zsuzsa*: E-tagoj en la Universitato ELTE. 71/3.  
*Kökény*: E. en la Budapeŝta Scienca Universitato. 73/2.  
*Berceli*: Hungara Kultur-Festivalo. 71/4.  
*Bálint*: Praktikaj informoj por la H. E. Festivalo. 72/2.  
*Balkányi*: Memorigiloj pri esperantistoj en Budapeŝto. 72/2.  
*Mátéffy*: Pri la festivalaj ekskursoj. 72/2.  
*Benczik*: Jubileo de Literatura Mondo. 72/4.  
*Kalocsay*: La tri vivoj de L. M. 72/4.  
*Kökény*: La libroeldonagado de L. M. 72/4. — Nia seminario apud Balatono. 73/1.  
*Bálint*: Mesaĝo al Vjetnamio. 73/1.  
*Farkas Ernő*: La unua Zamenhof-letero al Hungario. 73/1.  
*Rátkai Árpád*: Fondiĝo de HESL antaŭ 60 jaroj. 73/3.  
*E. F.*: Stratoj kaj esperantistoj. 73/3.  
*Csiszár Ada*: Ekstere — sur la strato. 74/2.  
 25-a H-landa E-Kongreso en Szolnok. 74/3.  
*Szenes Imre*: Intervjuo kun *Sándor Gáspár*, ĉefsekretario de SZOT. 74/5.  
*Mátéffy*: 25-a H. E.-Kongreso en Szolnok. 74/5.  
*S. J.* — *Ba.* — Hamburgo — UEA Kongreso. 74/5.  
*A. Cs.*: 16-a seminario en Zánka. 74/6.  
*V. B.* De Adisabebo al Budapeŝto. Intervjuo kun *Haile Negash*. 74/6.  
*E. P.*: Feriado de esperantistoj en Hungarlando. 75/1.  
*K. K.*: Sudhungarlanda Stelo. (E. en H-lando 1947—75). 75/1.  
*Blau Zoltán*: Jubileo. (*Gabro*) 75/2.  
 Komuniko pri la 7-a Konsultiĝo de E-asocioj... 75/2.  
*Orbán Attila*: Interparolo kun sekr. de *Intersindical* pri la portugalaj sindikatoj kaj pri la int. lingvo. (*Timár Gábor*) 75/2.  
*Virizlay Gyula*: La laboristoj kaj la lingvostudado. (*T. I.*) 75/3.  
*Sugár András*: Interparolo kun la prezidanto de la sovetaj esperantistoj. 75/4.  
 Studenta paĝo. VHZS. 75/4.  
*Fenyvesi*: Sukcesa kongreso en Kopenhago. 75/5.  
*Ro-Lo*: Int. Virina Renkonto. 75/5.  
*Knichal*: Pri E. en la sindikata konferenco. 75/6.  
*Gergely, Todorov, Grigorov, Valčev*: Nova grava iniciato. 75/6.  
*Benczik*: Impresoj de novbakita juriano. 75/6.

### KONSTANTAJ RUBRIKOJ

Panoramo. *Bálint Szilárd, Kalocsay Kálmán, Szabó Mária Rózsa, Szekeres József, SZMR*.  
 Humuro.  
 Krucenigmoj, FERI (*Fejes Márton* kaj *Rieth László*).  
 Leterkesto. El la leteroj. Korespondado, Kalendaro — en preskaŭ ĉiuj numeroj.  
 Ekzameno sen risko. *Benczik* ekde la n-ro 73/1. ĝis la n-ro 75/3 en ĉiuj n-roj.

Kunmetis: L. *Kökény*

# KION ONI POVUS FARI CELE DE LA INTERRILATIGO DE LA INTERNACIA SPORTO KUN LA INTERNACIA LINGVO?

*Interparolo kun d-ro Árpád Csanádi, ĉefsekretario de la Hungara Olimpika Komitato, membro de la plenum-komitato de la Internacia Olimpika Komitato*

Okaze de la ĉi-jara Montreala Olimpiko la numero 1./1976. de la hungarlingva ESZPERANTÓ MAGAZIN denove publikigis la signifan dokumenton de esperantista prisporta kampanjo lanĉita antaŭ dek jaroj. La dokumento, kies titolo estas „Publika Letero de hungaraj olimpikaj ĉampionoj kaj sportistoj al la Internacia Olimpika Komitato”, aperis sur la sporta paĝo de la n-ro de 30. 01. 1966. de NÉPSZAVA, la landa tagjurnalo de la hungaraj sindikatoj, krome ankaŭ en la n-ro 1/1966. de Hungara Vivo. Post la nuna ripetita publikigo de la dokumento en ESZPERANTÓ MAGAZIN, en aparta artikolo ni sumigis tie la sorton kaj efikon de nia kampanjo kun la titolo: „Kio okazis de post la Publika Letero? La internacia eĥo kaj sekvoj de hungara sporta iniciato.”

Baze de la faktoj skizitaj en tiu artikolo Hungara Esperanto-Asocio (HEA) turnis sin kun oficiala letero al la Hungara Olimpika Komitato (HOK). En la letero ni petis, ke la ankaŭ hodiaŭ aktualan proponon de la Publika Letero — kun ioma modifo — HOK prezentu nun ankaŭ oficiale al la plenum-komitato de IOK, t. e. al tiu korporacio, kies membro estas ankaŭ d-ro Árpád Csanádi, la ĉefsekretario de HOK. En nia plurflanke motivita letero interalie ni aludis ankaŭ tion, ke se HOK entreprenus fari tiun paŝon, tiam ĝi servus aferon internacisman, kiu estas en akordo kun la spirito de niaj socio kaj sporta politiko.

Pri la menciita modifo ni pensis pro tio, ĉar siatempe la Publika Letero petis de IOK: ĝi „akcelu, ke dum la internaciaj sportaj renkontiĝoj la ĉiam pli populariĝanta Esperanta lingvo estu akceptata kaj uzata kiel interkonsentita, oficiala lingvo.” Tiu peto inkluzivis do ankaŭ la pretendon, ke la internaciaj konsiliĝoj de la sportaj gvidantoj havu plu-

san oficialan lingvon, sed tio havus nenian sencon.

Multe pli esenca celo estas, ke la aktivaj sportistoj de la mondo povu interparoli kun siaj alilingvaj sportkunuloj. Por tio nia Asocio skribis al d-ro Árpád Csanádi, ke se nome de HOK li entreprenos la aferon, tiam kiel bazan konsideron de la prezentota oficiala peticio ni sugestus la sekvantajn:

La plenum-komitato de IOK lanĉu alvokon, kiu — sub la signo de la olimpika ideo — turnu sin al la sportistoj de la mondo kun tiuj kultura kaj morala rekomendoj, ke ili ellernu la plej facilan kaj plej rapide alproprigeblan fremdan lingvon, Esperanton. Tiu neŭtrala internacia lingvo estus la plej taŭga tiucele, ke en la sportaj konkursoj la sportistoj havu la eblecon, krom kompari reciproke siajn fizikajn kapablojn, ankaŭ interŝanĝi siajn pensojn kaj interamikiĝi laŭ homa kaj sport-kunula maniero. En ties intereso IOK atentigu ankaŭ la naciajn sport-federaciojn, ke kunage kun la landa Esperanto-Asocio ili organizu Esperantajn lingvo-kursojn por sportistoj kaj kune zorgu pri eldono de Esperanto-lingvaj sport-vortaroj kun la vorto-stoko de iliaj sportobranĉoj.

La letero de la estraro de HEA sciigis ankaŭ la nomon de pluraj renomaj sciencistoj-lingvistoj el la okcidentaj kaj socialismaj landoj, kiuj bone konas Esperanton. Nome, se la Internacia Olimpika Komitato inklinus fine okupiĝi pri tiu demando, tiam ĝi povus peti la opinion de tiuj lingvistoj, por kontroli la realecon de la skizita propono.

## UEA iniciatu

Ni petis d-ron Árpád Csanádi, ke en la nomo de HOK li bonvolu respondi al la letero de HEA en formo de intervjuo, kiun en Hungara Vivo

ni publikigus. La ĉefsekretario de la Hungara Olimpika Komitato konsentis tiun intervjuon kaj nian interparolon li tuj komencis jene:

— Mi bone komprenas la celon de via iniciato. Estus vere ĝojinde, se la internacia sporta vivo jam povus atingi ankaŭ tion, ke ĝi fruktuzu la internacian lingvon. Kvankam mi ne scias Esperante, tamen, kiomgrade mi estas informita pri la lingvo, mi opinias, ke ĝi povas esti taŭga ankaŭ por plifaciligi la interparoladon kaj daŭran interamikiĝon inter diverslingvaj sportistoj. Tio estas afero simpatia ankaŭ por mi.

— Tiam ĉu estus do eble, ke en la nomo de HOK sinjoro Csanádi entreprenus prezenti la aferon al IOK?

— La afero estas tamen ne tiel simpla. La Hungara Olimpika Komitato sola ne povas entrepreni tian pet-prezenton — ĉar tio ne havus realecon. Nome estas verŝajne, ke tre granda plimulto de la naciaj olimpikaj komitatoj kaj de la membroj de la plenum-komitato de IOK ne estas kontentige informita pri la lingvo Esperanto. Pro tio tia hungara peticio ne povus esti traktata en la plenum-komitato de IOK, ĉar eĉ por esti metita en la tagordon ĝi ne ricevus sufiĉe da apogo.

— Laŭ via opinio kiel oni povus solvi, ke la ĝenerale konata lingva problemo de la internacia sporta vivo fine aperu antaŭ la plej prestiĝa internacia sporta forumo? Kaj kion oni povus fari por tio, ke la internaciaj sport-gvidantoj demetu sian malintereson koncerne tiun demandon?

— Miaopinie estas bezonate unua-vice, ke Universala Esperanto-Asocio turnu sin kun rekta propono al la plenum-komitato de IOK, kaj al la Kontoro de la Organizo de la Naciaj Olimpikaj Komitatoj en Romo. Ĉar se tiuj du internaciaj organizoj (t. e. UEA kaj IOK, rim. de la tradukinto) ekinterrilatus unu kun la

alia, tiam la esperantistoj per konvinkaj argumentoj kaj rekte povus apogi siajn proponojn, kiuj celas la solvon de la lingva problemo.

## Meti en la tagordon de la Afrika general-kunsido

— Jes, tio estus dezirinda, kaj la afero havus rezulton eble ankaŭ ĉe IOK, se la plimulto de ĝiaj membroj prijuĝus la problemojn de la multlingveco en ilia realeco. Ĝuste pro tio la iniciato de UEA povus sukcesi sole tiam, se IOK pesus la demandon kun la intenco kontribui al la pli bona lingva interkompreno en la internacia sporta vivo. Kiel vi vidas tion, sinjoro Csanádi?

— Ankaŭ mi ne pensis, ke la paŝo de Universala Esperanto-Asocio sufiĉus. Al tio necesus ankoraŭ, ke ĉiuj Esperanto-asocioj en la mondo ekkontaktu kun la sialanda nacia olimpika komitato kaj informu ilin pri nia nuna temo, t. e. pri la ebleco de la solvo de la lingva problemo en la sporta mondo laŭ la rekomendo de via movado. Ekzemple sekvontjare okazos la ĝeneral-kunsido de la naciaj olimpikaj komitatoj en la ĉefurbo de la Afrika Eburio, en *Abidjan*. Tie estus ebleco meti en tagordon la utiligon de Esperanto en la sporto, ĉar tie eventuale povus naskiĝi pozitiva rekomendo. La naciaj kaj internaciaj Esperanto-organizoj klopodu do gajni la nacian olimpikan komitaton de kiel eble plej multe da ŝtatoj tiucele, ke en la jaro 1977 tiu demando estu metita en la tagordon de la ĝeneral-kunsido en *Abidjan*, kaj tie la proponantoj aktive insistu pri la afero.

— Tio estas bona ideo. Por realigi ĝin, la landaj asocioj de la Universala Esperanto-Asocio tutcerte kontaktiĝus kun la sialanda nacia olimpika komitato. Sed post tio, ke la estraro ĉe la Hungara Esperanto-Asocio jam faris tiun paŝon, kion ni povas atendi de la Hungara Olimpika Komitato? Tio estas grava demando ankaŭ tial, ĉar kelkajn monatojn post la apero de la Publika Letero, Gyula *Egri*, la tiama gvidanto de la hungara ŝtata sport-oficejo kaj eksa prezidanto de la Hungara Olimpika Komitato deklaris en la n-ro de 21. 04. 1966. de *Népszava* ke se la Publika Letero estos fakte traktata, tiuokaze HOK oficiale apogos ĝin.

## Per vico de aktivadoj – kaj ankaŭ per hungara ekzemplo-dono

— Mi memoras tiun deklaron. Sed kiel ankaŭ vi scias kaj kiel pli frue mi jam skizis, de tiam la cirkonstancoj ŝanĝiĝis. Pro tio, koncerne la novan iniciaton de via asocio, — sen rajtigo — en mia propra nomo mi povas diri nur, ke en venontaj okazoj mi konsultus kun la gvidantoj de la naciaj olimpikaj komitatoj de aliaj landoj pri la ebleco interrilatigi la internacian sporton kaj la internacian lingvon. Sed samtempe estus bone, se ni ricevus informojn pri tio, ke kelkaj eksterlandaj Esperanto-asocioj jam atingis similan proksimiĝon al la sialanda nacia olimpika komitato.

— Kaj se tio estos okazinta, ĉu ni povus kalkuli pri tio, ke la aferon apogus ankaŭ la Hungara Olimpika Komitato sekvontjare en Afriko, en la ĝeneral-kunsido de la plenumkomitato de IOK kaj de la naciaj olimpikaj komitatoj?

— Mi pensas, ke jes. Post tiel zorgema prepar-laboro ankaŭ nia opini-deklaro havus pli grandan pezon. Ĉio dependas de tio, ke la eksterlandaj Esperanto-asocioj kiel povus gajni por la afero la sialandan olimpikan komitaton.

— Aliparte tio dependos de tio, kiomgrade la naciaj olimpikaj komitatoj estos kapablaj rekoni, ke en tiu lingva demando ne la movadaj interesoj de la esperantistoj estas la primaraj, sed la homaj intelektaj interesoj de la aktivaj partoprenantoj en

la internaciaj sport-konkursoj. Kiel vi opinias pri tio?

— Mi akceptas, ke ĉi tie temas unuavice pri la intereso de la sporta mondo, sed estas evidente, ke tio popularigus ankaŭ Esperanton.

— Mi dankas la intervjuon.

— Plezure. Kaj multan sukceson mi deziras al tiu celado de la hungara kaj internacia Esperanto-movado, ke oni parigu la internacian lingvon ankaŭ kun la olimpika ideo, en intereso de paca konkurado inter la popoloj kaj vera interamikiĝo de iliaj sportistoj.

\*

La supran intervjuon ni publikigas samtempe ankaŭ en nia hungarlingva frat-revuo. Tiun ĉi numeron de Hungara Vivo ni sendos ankaŭ al ĉiu landa kaj internacia organizo kaj redakcio de la Esperanto-movado. En aparta akompana letero ni rekomendas kaj petas, ke oni bonvolu utiligi kaj realigi la proponojn kaj favoran opiniadon de d-ro Árpád Csanádi, la ĉefsekretario de HOK kaj membro de la plenumkomitato de la Internacia Olimpika Komitato, — kaj faru la komplezon informi nian asocion aŭ nian redakcion pri la koncernaj rezultoj kaj spertoj.

La intervjuon faris: Imre Szenes

(Tr.: Tibor Ujlaky—Nagy)

## NOVA ĈEFEPISKOPO

### en la Hungarlanda katolika eklezio

En februaro okazis antaŭ la ŝtatprezidanto la solena ĵuro de la nun nomumita ĉefepiskopo d-ro László *Lékai*, kaj poste lia enoficigo en la rezidejon en Esztergom. Tiuokaze la ĉefepiskopo donis deklaron por la preso, el kiu ni komunikas ĉi-sube partojn; jene.

— La interkonsentoj, estiĝintaj antaŭ nelonge inter la Vatikano kaj la Hungara Popolrespubliko ebligis la plenan restarigon de la antaŭa hierarkio en la Hungarlanda katolika eklezio. Koncerne mian nomumon, mi prefere parolas pri misio, ol pri rolo. Mi rigardas mian mision, kiel senlaca laboradon, por ke la katolika eklezio kunlaboru per krea forto en la plua feliĉigo de la hungara patrio kaj popolo.

Mi volas stari sur la tereno de la realecoj. En socialisma komunumo ni, kredantoj kaj nekredantoj, vivas kune. Ĉi tie ni ĉiuj volas prosperi kaj evoluigi tiun vivon inda je homo. El mondkoncepta vidpunkto la popolo de nia patrio ne estas unueca, tamen ni scias, ke ni povas krei harmonion, se ni ne rigardas, kio nin disigas, sed kio kunligas nin. Ni, kredantaj katolikoj, deziras honoro la mondkonceptan konvinkiĝon de aliaj. Sed ni atendas, ke ili ankaŭ honoros nian konvinkiĝon. Precipe tiam, se ili spertas, ke elirante el nia religia mondkoncepto, ankaŭ ni kapablas alproksimiĝi al la streboj de evoluanta socialisma lando.

Ni vivas en tiu epoko, kiam la atomenergio malfermas grandegan perspektivon antaŭ la homaro. Tamen, por nia estonto ekzistas nur ununura sekura bazo: la paco. Ni estas konvinkitaj, ke en la porpaca kunlaborado la eklezio havas konsiderindan rolon — finis la deklaron la ĉefepiskopo.

Tr. I. László

# STUDENTA PAGO

## Sukcesa konferenco en la Esperanto-fako de Budapeŝto



D-ro Alessandro Bausani kaj d-ro István Szerdahelyi

Pasis jam dek jaroj, ekde kiam komenciĝis la instruado de Esperanto en la Filologia Fakultato de Universitato Eötvös Loránd. En la vivo de pli tradiciaj fakoj — filozofio, pedagogio, greka-latina — tiom da tempo estas nur momento; sed por nia fako tiuj dek jaroj signifas, ke la supera Esperanto-instruado fariĝis plenkreska.

Ni ne volis lasi, ke tia grava jubileo forpasu neatendite. Konsciiĝinte, ke la fako estas jam sufiĉe matura por doni hejmon al serioza evento, ni komencis organizi konferencon pri interlingvistiko, kaj kunligis ĝin kun la 5-a Renkontiĝo de Enlandaj Esperantistaj Studentrondoj. Post fervora organiza laboro — invito de en- kaj eksterlandaj lingvistoj, interlingvistoj —, kaj per la valora helpo de l' Katedro pri Generala kaj Aplikita Lingvistiko (kie la E-fako funkcias), kaj per tiu de Hungara E-Asocio, la konferenco malfermiĝis la 5-an de aprilo.

Pro la partopreno de kelkaj famaj eksterlandaj esperantistoj kaj hungaraj lingvistoj, ni trankvilanime baptis nian konferencon Internacia Interlingvistika Konferenco. Ĝi meritas tiun nomon ankaŭ pro la intelekta nivelo kaj scienca etoso, kiuj karakterizis la tritagan kunsidon, daŭrantan ĝis la 9-a de la sama monato. Kaj ni rajtas aserti, ke la studentoj-prelegantoj de la paralela studentronda konferenco plifortigis la sciencon, iliaj laboraĵoj tute ne postrestis tiujn de la „granduloj”.

Pri kio temis do en la duobla konferenco? Tre rezume: pri la serioza konsidero de Esperanto el scienca, lingvistika vidpunkto. Ni intence diras „serioza” kaj „konsidero”, ĉar jam multfoje aŭdis prononci tiujn

vortojn neserioze kaj nekonsidere, temante pri la samo.

Jen kelkaj pruvoj pri la vera seriozeco de nia konferenco, kaj pri la konsidero de Esperanto kiel pritaksenda materialo de ĝenerala lingvistiko kaj interlingvistiko:

La unuan gravan fakton mi vidas en tio, ke la konferencon malfermis ne esperantisto, sed iu persono havanta grandan reputacion: nome, d-ro János Balázs, katedrestro pri Ĝenerala Lingvistiko, publike pravigante tiel, ke la apogo de Esperanto ene de la katedro ne estas ludo per la vortoj, sed fakta, reala, bonvola helpo. Do, dek jaroj de laboro ne estis vanaj, en la universitato ĉiu scias almenaŭ tion pri Esperanto, ke ĝiaj adeptoj konstante, konsciencie laboras. Tiun dekjaran agadon prezentis, post la salutvortoj de d-ro Balázs, la konata fakestro, d-ro István Szerdahelyi.

Due, estas unika fakto, ke tiel famaj hungaraj ne-esperantistaj lingvistoj, kiel László Antal kaj Dénes Vargha, volonte akceptis nian inviton prelegi en la konferenco, konsiderante ĝin signifa. Ambaŭ prelegoj vekis fervoran disputemon inter la ĉeestantoj, kiuj devas esti kontentaj, ĉar ili klasiĝas inter la ne tro oftaj bonŝancaj aŭskultantaroj de iu ajntema Esperanta konferenco. Dénes Vargha — lingvisto-matematikisto — eksorĉis nin per sia personeco, pedagogiemo, sciante ekŝatigi kaj ekkomprenigi tian malfacilan temon, kiel la rilato inter matematikaj kaj lingvaj rilatoj. Dume docento Antal, ne malpli simpatie, parolis pri Esperanto el vidpunkto de moderna lingvisto, tuŝante tiujn konsiderojn, pri kiuj eĉ la plej elstaraj esperantistoj ne pensis ĝis nun, ne havante

la altan ĝeneralan vidmanieron de sobre pensantaj lingvistoj.

Kaj la tria fakto konsistas en tio, ke la hungaraj scienculoj ricevis egalrangajn disput-kolegojn; aŭ inverse, la grandaj eksterlandaj esperantistoj, veninte en Hungarion, trovis ne nur entuziasmulojn, multonsciantajn amatorojn, sed kapablajn kolegojn. La nura persona konatiĝo estus signifega, sed al tio aldoniĝis altnivela faka konatiĝo. La prezidanto de UEA, Humphrey Tonkin, povis ĉeesti nur pere de sia prelego laŭtlegata; sed la aliaj niaj gastoj hejmenportis — ni esperas — pozitivajn, konstruivajn spertojn, krome ke ili alportis al ni valorajn priesperantologiajn kaj priinterlingvistikajn prelegojn: d-ro Alessandro Bausani, profesoro en Universitato de Romo, akademiano; Jerzy Uspienski, ĉefredaktoro de Pola Esperantisto, kunlaboranto de CED; Peter Zlatnar, gvidanto en Jugoslavio de la Internacia Pedagogia-Didaktika Eksperimento; Hermann Behrmann, kunlaboranto de Helmar Frank en la Paderborna Pedagogia-Kibernetika Instituto.

La kvara grava fakto baziĝas sur ĉi tiuj tri supraj: videblas, ke la konferenco ne estis en-sin-fermiĝanta, kiel la plejmulto de similaj esperantistaj eventoj. Kaj ne pridubblas, ke tiu nefermiteco kontribuis al la plialtigo, plisciencigo de la nivelo kaj etoso de la konferenco. Ni konsilas al ĉiuj organizantoj de similaj eventoj pripensi: ĉu ne estas sekvin-da vojo klopodi enigi en la pridiskuton de niaj problemoj ankaŭ ne-esperantistajn, kompetentajn spertulojn?

La sukceso de nia konferenco jesas tiun demandon. Kvankam ne troigante la rezultojn, la komenca paŝo estis kontentiga.

— VHZS —



# HARFAJNAJ RADIKETOJ

Mi staras dimanĉon antaŭtagmeze ĉi tie sur la mallarĝa ĉefplaco de *Régusse*, ĉirkaŭbarita de altaj domoj, en la ozona montara aero. Estas la komenco de vintro kaj ni estas je alto de kvincent-sescent metroj, tamen el la sennuba, lazura ĉielo la suno verŝas majan varmon, ĉar ankaŭ ĉi tiu loko situas en „Lazurlando”. Marsejlo distas fluglinie kvardek kvin kilometrojn. Survoje ĉi tien antaŭ dudek minutoj ni ankoraŭ preterlasis turaltajn palmojn kaj, pli frue, florantajn kaj samtempe fruktantajn oranĝarbojn.

Ĝi ne estas la unua alpa vilago ĉi tie en supra Provenco, kiu plezurigis min, sed nun aldoniĝas ankoraŭ io speciala al mia travivaĵo.

Ĉi tiu bona travivaĵo estas solena. Solena estas ankaŭ la eksteraĵo, kie la konfuza — kaj pro tio klarigenda — sento min kaptis.

Sur la placo la vic-prefekto de la vilaĝo, Monsieur Gabriel Sappe, akceptis min. La juna notario de la vilaĝo, M. Bernard Sappe, filo de la ĵus menciita Sappe, malfermas la pordon de nia aŭtomobilo kun ĝentila komplezo. Ili bedaŭras, ke la prefekto mem ne povas ĉeesti, ĉar li estas malsana kaj kuŝas en la hospitalo. Sed anstataŭ li ĉi tie estas la tuta estraro de la loka Historia kaj Region-esplora Komitato: M. M. Marcel Jean, Mlle Mireille-Agnès Bagarre, Mme Gustav Pères.

La manskua de la diktrunka, fortmuskola s-ro Gabriel Sappe estas tiel afabla, ke ĝi fariĝas preskaŭ brakumo kaj tiu de la aliaj estas simila. Videblas, ke krom la kutima ĝojo de gastameco, ili havas ankaŭ ian aldonan travivaĵon.

La klarigo de ĉi tiu speciala travivaĵo povas interesi ankaŭ pli vastan rondon ol tiun, kiu nun ĉi tie svarmas ĉirkaŭ nia aŭtomobilo, pli kaj pli multiĝante kun tiuj, kiuj rapide venas el la domoj. Sed kiel oni devus komenci klarigi ĉi tion?

En mi — por ke mi prezentu min la unua kiel esplorendan subjekton — kaŝiradas tiu absurda ideo, ke mi devus stari sur ĉi tiu placo antaŭ kvarcent jaroj — tio estus la vera, la baza travivaĵo — kiam laŭdire la nomo Sappe ankoraŭ estis elparolata Papp; Jean: János, Bagarre: Bogár kaj Pères simple Piros; kiam la tuta vilaĝo ankoraŭ estis hungara kaj ankaŭ en la ĉirkaŭaĵo estis eĉ dek aŭ dekkvin tiaj vilaĝoj, se ne pli. Jes, ĉi tie sur la supro de Provenco.

Antaŭ precize kvarcent tridek kvar jaroj, en 1533, venis ĉi tien en la tiaman urbeton Régusse, tute neologata kaj kuŝanta duone ruinigita, la unuaj hun-

garaj koloniuloj el la sklav-komercejo de Konstantinopolo.

Kaj ilia legenda historio, kiun mi elaŭskultis, estas la sekva:

En 1526 tuta Hungario sterniĝis surtere ĉe Mohács pro terura pugnobato. La anarkia lando de etreĝoj staris kontraŭ necedema, centraliza, militista ŝtato. Se tiaspeca, masiva potenco povas atingi oligarkiojn en la ĝusta proksimo, ĝi tiel disfalis ĉiujn, kiel la globo de kegloludanto la keglojn. La tiam turka militforto, se ĝi povus havi lokon apude, sternus iun ajn oligarkian landon de Eŭropo. „La masakranta jarcento de *Zápolya*”, kiu aliloke estas nomata la epoko de la centjara milito, naskis en la okcidento popolpereigantojn eĉ pli senrespondecajn ol niaj etreĝoj. Sep jarojn post Mohács la otomana hegemonio, per siaj kruelaj organizaĵoj, el la hungaraj vilaĝoj, restintaj sen defendoj, incendiitaj, senobstakle elpelis en longaj marŝoj la popolon kapblan perpiede iri: la junan viron, virinon kaj la adoleskulojn. La aliaj kuŝadis tie sub la karboniĝintaj restaĵoj.

Imagebla estas la trafiko de la sklav-komercio de Konstantinopolo, se la terura „varo” venis eĉ en Francion. Ankaŭ ĉi tio havas sian historion.

La oligarkio, eĉ sen ekstera helpo, tute ruinigis parton de Provenco. La internaj bataloj, la religiaj militoj kaj fine la pesto senpopoligis aron da vilaĝoj. La Johanita Ordeno, iam fondita en Jerusalemo — ties kompleta nomo estas la Jerusalema Kavaliroordeno de Sankta Johano la Resaniganto — fariĝis la preĝej-patrono kaj fine la sola posedanto de la malpleniĝinta teritorio.

Ĝi havis ankaŭ „pacan” kontakton kun la turkoj. Kaj, ĉar de post Francisko la Unua ankaŭ Francio kunlaboris kun la Plejalta Pordego, estiĝis la interkonsento, ke la Johanitoj — en bela asocio de intereso kaj kristana konscienco — denove faru profitdona la dezertan francan kamparon per siaj samreligianoj elaĉetitaj de la otomana sklaveco.

Dum entute dudek kvin jaroj trafikis la ŝipoj inter Konstantinopolo kaj Marsejlo, laŭ la atesto de la arkivoj ekzistantaj ankoraŭ hodiaŭ.

La unua enskribita nomo, kiun oni povas opinii hungara, estas *Rigódy*. Certe tiu devenas de iu loĝloko Rigód de la regiono *Szerémség*, tiam dense loĝata de hungaroj.

La franca historiografio ĉion ĉi plurfoje aludis. Ke Régusse kaj ĝia ĉirkaŭaĵo estis hungara kolonio, estas antaŭ mi presite ankaŭ en la libro pri loka historio de la departemento. Sed la Régusse-anoj mem

sciigiĝis pri tio de unu el niaj samlandanoj alveninta ĉi tien antaŭ kelkaj jaroj. Ankaŭ mi povas danki al li — Artur *Garamvölgyi*, la nelaciĝema kolektanto de informoj — ke mi nun staras ĉi tie kaj rigardas kun nekontestebla kortuŝo la emociiĝintajn Régusse-anojn.

Nur la historio mem — tiu kvazaŭ historia romano memoriganta pri *Jókai* kaj *Gárdonyi* — sufiĉus, por ke ni faru ĉi tiun flankeniron sur la vojo de Cannes al Parizo. Sed pli interesas min ĉi tiu reciproka emociiĝo ol historia fakto aŭ romantiko. Kio estas ĝia vera kaŭzo kaj senco? El kio ĝi estiĝas kaj kien ĝi kondukas? Ĉu ĝi estas utila aŭ senutila, aŭ ĉu eble malutila, ĉar ĝi ja kondukas al neexplorita teritorio, eĉ provizita per la tabulo „dangeŝa” ĉi tie kaj tie.

Precize respondi tion ne estas tiel simple, kiel ŝajnas en la unua momento. Unu el la plej disbranĉiĝantaj problemoj de nia epoko etendas ĝis ĉi tie — ĝis la fund-tavolo de la animo — siajn harfajnajn radiketojn.

En la pli ĝusta nacia konceptado, tio estas la kolektiva sento.

Elstara franca poeto kaj profesoro pri filozofio veturigis nin ankaŭ ĉi tien, al Régusse. Mi havis okazon interŝanĝi vortojn kun li pri la filozofia kaj sociologia flanko de la demando. Nun mi dezirus paroli pri tio kun la Régusse-anoj, kvazaŭ de praktika flanko.

Malgraŭ ke tie kaj aliloke etaĝaj, du- eĉ trietaĝaj, sveltaj domoj estas strikte premitaj unu al la alia, Régusse ankaŭ hodiaŭ estas kampara vilaĝo, karakterize Provenca. Ĉiu, kiu laboras, vivas el la kultivado de la vito, la olivarbo, la lavendo kaj iom da greno; ankaŭ el la ĉasado — apro troviĝas ĉi tie — kaj el la vendo de trufoj.

M. Gabriel *Sappe* prenas min ĉe la brako per sia peza manplato, vere tiel afable, ke pro tio li povus esti eĉ mia onklo Gábor *Papp*, kaj gustume ĉirkaŭpromenigas min en la koro de la vilaĝo. Poste li kondukas min al la „*mairie*”, en la vilaĝdomon.

Jen, ĉi tiu estas lia oficiala ĉambro kaj tiu la registrejo, pli ĝuste la arkivejo.

Ĝis la malproksima mezepoko ekzistas la libroj pergamene kaj lede binditaj. Unu estas larĝa je manplato kaj ankaŭ tiel maldika. Alia estas eĉ pli dika kaj pli peza ol meslibro. Kaj estas rulaĵoj kaj folioj sur bretaro kovranta tutan muron. Kaj tiuj, kiuj interesas nin, estas jam pretigitaj sur la tablo.

Retrofoliumante libron post libro oni povas sekvi per la okuloj kiel aperas laŭ nia klarigo la hodiaŭa familia nomo *Fouque*, antaŭe *Fouques*, poste *Fouquos* kaj fine *Foquos*. tio estas *Fokos*; kiel la *os* disrompiĝis de *János* kaj de la nomo estiĝis *Jean*, kiel *Béressi* sangiĝis je *Bressi*, *Pór* je *Porré*, *Márton* je *Marton* kaj *Fábri* je *Fabrès*. *Papp* fariĝis *Sappe* tutsimple, ĉar la franca paroĥestro, skribante la majusklan *p* de malsupre al supre, tiel larĝigis ĝin ĉe ĝia supro, ke ĝi povis esti ankaŭ la majuskla *s* kaj ĉar por li *Papp* ne havis sencon, male *Sappe* havis: ĝi signifas serpon.

La entuziasmaj membroj de la Historia Komitato, kun la helpo de sia hungara amiko bone scianta ankaŭ latinon, opiniis, ke ili malkovris ĝis nun la spuron de preskaŭ ducent kvindek hungaraj familioj. Ĝi estas grandega nombro. Ni pripensu: en kiom da hungarlandaj vilaĝoj eblus spuri la devenon de la hodiaŭaj loĝantoj tra tricent-kvarcent jaroj?

Dum horoj ni profundiĝis en la laŭsilaban legadon de mucidaj, polvoplenaj pergamenoj tiagrade, ke eĉ mi mem povas kontribui al la komuna laboro per la malkovro de eta informo.

En unu el la bapto-enskribaĵoj de la analoj de 1660, la nomoj de la gepatroj estas *Louiza Bourquas* kaj *György Agnol*. Kio povas esti *Bourquas*, oni ne scias, sed malantaŭ *Agnol* evidente kaŝas sin *Angyal*. Sed la plej grave estas, ke antaŭ *Agnol* oni ne skribis la baptonomon franclingve *Georges*, sed la o estas ankoraŭ punktita: *György* oni skribis aŭ diktis.

Ankaŭ mi gapis al ĝi, sed mi ankoraŭ dubis.

Ĉu do en 1660 oni ankoraŭ parolis hungare en la vilaĝo, aŭ ĉu estis, kiuj ankoraŭ parolis ankaŭ hungare? Hungarece ili skribigis siajn nomojn.

Laŭ informoj devenantaj de aliloke, la koloniantoj venintaj ĉi tien, geedziĝis ekskluzive inter si dum tri generacioj. Poste ili komencis miksiĝi kun la praloĝantaro denove penetranta en la montojn. Estas nenia indiko, ke ili iam havis interrilatojn kun la Danuba-Tibiska patrio, krom se ilia pastro, vivanta ĉe la fino de la 17-a jarcento, venis de tie post ili. Ankaŭ sian strangan nomon ĉiufoje — tra jardekoj — li tiel subskribas hungarece: *Szörme*, aŭ pli ĝuste *Szörmé*, por ke laŭ la franca ortografio, la *e* ĉe la fino de lia nomo ne estu silenta. Mi rigardis ĝin dufoje, eĉ trifoje, sed tiel ĝi estas, kvankam *Szörme* estas sufiĉe malofta hungara nomo.

Sed kiel ajn interesaj estas ĉi tiuj informoj, tamen mia ĉefa zorgo — intence reganta min — ne estas ilia sekado. Mi ja ne estas lingvisto. Mia ĉefa zorgo — nun mi ripetas — estas la analizo de tiu animstato, la difino de tiu spirita soifo, kiu volas nutri sin eĉ per tiuj faktoj, kies efiko antaŭlonge perdiĝis, kaj ankaŭ per sekaj lingvistikaj informoj.

Neniam estas pli bona la okazo por ĝia malkovro kaj analizo.

Ni elvenis el la „*mairie*” kaj rigardis la preĝejon kaj la fortikaĵon, kiu post tiu tempo denove ruiniĝis. Ni iris antaŭ la monumenton de la herooj de 1914—1918; ĉiu tria nomo estas tia hungara nomo enkapsuliĝinta en la franca lingvo. Ĉi tie ni sidas — nun jam proksimume dekkvinope — ĉirkaŭ la tabloj elmetitaj antaŭ la *Café du Cours*, sub la preskaŭ tro varma tagmeza suno. Ankaŭ ĉi tie estas iaspeca fortikaj-remparo. Antaŭ ni sube, senfine etendiĝas la arĝentgriza kaj rustruĝa provenca pejzaĝo. Dekstre estas svarmo da infanoj en ĉemizmanikoj kaj mallongaj pantalonoj, kurantaj tien kaj reen. Maldekstre, same en ĉemizmanikoj, estas aro da viroj. Post longa mezurado ili alten svingjetas brilajn ferglobojn al malproksimaj celpunktoj. Ili ludas la

*Orientiteco.* — Sinjoro, mi petas vin, ĉu vi scias al mi diri, kie estas la Urba Muzeo?

— Bedaŭrinde mi ne scias, mi nome loĝas tie ĉi en la urbo.

\* \* \*

*Kontento.* — Ĉu vi estas kontenta pri via edzino?

— Ŝi estus ideala edzino, se ŝi ne postulus de mi, ke mi estu ideala edzo.

\* \* \*

*Kritiko.* — La dramaŭtoro demandas post la ĉefprovo konatan kritikiston:

— Kion vi opinias pri la dramo? Ĉu vi eble trovas bona ian ŝanĝon?

— Kelkaj ŝanĝoj vere estus bonvenaj, ekzemple la ĉeffiguro devus sin ne veneni, sed mortpafi.

— Kial?

— La pafo vekus la spektantojn.

\* \* \*

*Gazetanonco.* „Komencanta stenografistino-tajpistino serĉas direktoron balbutantan.”

\* \* \*

*Konkludo.* Angla ĝentlemano sidas en sia klubo. Aliras lin alia klubano kaj demandas:

# Humuro

— Pardonon, sinjoro, ĉu vi ne emus ludi kun mi partion de ŝako?

— Ekskuzu min, sed unufoje en mia vivo mi ludis ŝakon kaj mi trovis ĝin tiom enuiga, ke mi neniam ŝakis plu.

Post kelka tempo revenas la ŝakemulo kaj diras: — Mil pardonojn, sinjoro, sed ni bezonus kvaran partneron por briĝo. Ĉu vi ne partoprenus la ludon?

— Bedaŭrinde ne. Unu fojon en mia vivo mi ludis briĝon, sed mi trovis ĝin tiom enuiga, ke mi neniam briĝis plu.

Post nelonge la ludemulo venas ankaŭ triafoje:

— Mi apenaŭ trovas vortojn, kiel el peti pardonon, sed ni volus ludi kriketon kaj unu ludanto mankas. Ĉu vi ne emus kunludi?

— Ne, sinjoro. Ne koleru. Unufoje en mia vivo mi ludis kriketon, sed mi trovis ĝin tiom enuiga, ke neniam mi ludis plu. Ho, sed jen venas mia filo, li estas bonega kriketludanto, li certe kunludos. Mi ĝojas, ke mi povis vin helpi.

— Multajn dankojn, sinjoro, sed permesu ankoraŭ demandon: ĉu la juna homo estas via sola filo?

— Jes.

— Nu, mi estis certa pri tio.

\* \* \*

*Malagrabla.*

Viro plendas al psikiatro:

— Mi tre amas la muzikon simfonian.

— Trankviliĝu, ankaŭ mi.

— Sed mi povas ĝin vere ĝui nur tiam, se dume mi kuŝas sur la planko kaj malfermas miajn okulojn.

— Kial tio estas plendinda?

— Ĉar kiom-ajn-foje mi kuŝiĝas kaj konvene min lokas, venas la bilet-kontrolisto kaj min eljetas el la koncertejo.

\* \* \*

*Kondiĉoj.*

Oni diras al la viro, kiu sin anoncis por la posteno de nokta gardisto:

— Ni bezonas homon, kiu havas kvazaŭ sesan senson por rimarki ĉion malordan, ĉiajn nekutimajn okazaĵojn; kiu akceptas malkonfide ĉion aŭdatan aŭ vidatan, agas fulmrapide, se io ne ĝustas, kaj ĉiam supozas, ke la alia ne estas prava.

— Ho, aŭdu! — diras la anonciĝinto —, mi sendos al vi mian edzinon.

konatan globludon de la francoj. Sed de tempo al tempo ili atentis pri la jam ŝerca konversacio fluanta ĉi tie — pri nia spirita ludo.

Mi sentas, ke la okazo estas favora por kolekti opiniojn. Ĉirilate mi ne kutimas sekvi la metodon de la kaŝemuloj, nek la metodon de tiuj, kiuj deflanke alproksimiĝas al la esenco, malplej en la societo de la tiel nomataj „simplaj homoj”. Mi rakontas, kvazaŭ ĉe malfermo de asembleo, kio absorbas min kiel sekvo de ĉi tiu bela renkontiĝo, la „revido”. Ankaŭ ili diru sian opinion: kio kunligas nin — je la distanco de kvarcent jaroj? Kial ni ĝojas pri ĉi tiu interkonatiĝo, kiu povas havi nenian „realan” daŭrigon. Ni vere interkonatiĝu!

— Ĉar ni bone fartas! — diras fraŭlino Mireille-Agnès Bagarre, ruĝiĝante, eble pro tio, ke la vortoj elvenis el ŝia buŝo tro entuziasme, aŭ eble pro tio, ke ŝi — kiel ni mem jam povis vidi en ŝia nomo — estas nur duone kalkulebla kiel hungardevena, kvankam ŝi estas unu el la plej fervoraj anoj

de la esplor-grupo. Ni jam ekkonis ŝin hieraŭ, kiam ŝi kun Marcel Jean venis ĝi *Draguignan* akcepti nin kaj ili aliĝis al ni, per sia aŭtomobilo irante antaŭ la nia, por ke ni ne devojiĝu sur la montaj vojoj: post kiam kune kun ili ni jam rigardis la tiean memortabulon de Sándor Kisfaludy.

— Sed kial ni bone fartas? Ĝuste tio estas la demando!

— Ĉar por la honestaj homoj ĉiu okazo estas bona, por ke ili kunestu — diras pripenseme Gabriel Sappe.

Pri tio oni jam povas mediti.

Sokrato frekventis la agoron por disputi inter la botistoj. Li portis hejmen tiajn „simplajn” frazojn kiel abutmenton de sia filozofio.

Ankaŭ la ĉi-tiea senafekta frazo ŝajnas taŭga por esti apogkolono de ajna scienca disertacio, kiel malfrua kontribuado al la tiel nomata amaspsikologio, plej ŝatata tereno de niaj oftaj studentdebatoj.

Tr. *Ēva kaj Bernard Golden*

# KALENDARO

1876—06—02 Antaŭ 100 jaroj mortis Hristo Botev, bulgara poeto.

1901—06—04 Antaŭ 75 jaroj naskiĝis Izrael Lejzerowicz, pol-hebrea esperantisto. Lia plej konata satira verko aperis sub pseŭdonimo Georgo Verda kun titolo: El la Verda Biblio.

1946—06—06 Antaŭ 30 jaroj mortis Gerhard Hauptman, Nobel-premiita germana dramverkisto.

1876—06—07 Antaŭ 100 jaroj mortis George Sand, progresema franca romantikisma verkistino.

1886—06—17 Antaŭ 90 jaroj mortis A. N. Ostrovskij, rusa realisma dramverkisto.

1936—06—18 Antaŭ 40 jaroj mortis Maksim Gorkij, soveta rusa verkisto, pioniro de la socialisma-realisma stilo.

1941—06—21 Antaŭ 35 jaroj ekatakis Sovetunion la faŝisma Germanio.

1896—07—01 Antaŭ 80 jaroj naskiĝis Salo Kornfeld, pola esperantista verkisto, konata sub pseŭdonimo Grenkamp.

1961—07—02 Antaŭ 15 jaroj mortis Ernest Hemingway, Nobel-premiita usona verkisto.

1921—07—04 Antaŭ 55 jaroj mortis Antoni Grabowski, pola E-verkisto, poeto kaj tradukisto. Lia plej brila traduko estas „Sinjoro Tadeo” de Mickiewicz.

1896—07—19 Antaŭ 80 jaroj naskiĝis Otto Ginz, ĉeĥoslovaka esperantisto-verkisto, vortaristo. Li estis redaktanto de la „Ĉeĥoslovaka Antologio” kaj „Radio-amatora vortaro kvinlingva”.

1856—07—26 Antaŭ 120 jaroj naskiĝis Bernard Shaw, Nobel-premiita angla dramverkisto, socialisma publicisto.

1901—07—29 Antaŭ 75 jaroj naskiĝis Gaston Waringhien, prezidanto de Akademio de Esperanto, verkisto, lingvisto, vortaristo, eseisto.

L. Rieth

## <sup>A</sup> Sakistoj atentu!

Jus ni ricevis interesan kvinligvan (angla, Esperanta, germana, hungara, rusa) informilon pri "Ŝak-festivalo de departamentoj Tolna kaj Bács" aranĝota de tri hungaraj urboj: Dombóvár, Kalocsa kaj Szekszárd inter la 4-a kaj 8-a de aŭgusto en tiu ĉi jaro. La organizantoj anoncis (en ĉiuj kvin lingvoj) ankaŭ konkurson en du klasoj por prezenti kaj solvi diversajn kombinaĵojn. Ĉar la limdato por ensendi tiujn konkursaĵojn estas tro proksime, nun ni ne konigas detale la alvokon, sed ni mencias, ke ekde la sekvonta numero (HV 76/4) ankaŭ nia revuo aperigos regule rubrikon por ŝakistoj. La rubrikon zorgos inicianto kaj organizanto de la menciitaj internaciaj ŝakfestivaloj, respektive konkursoj: d-ro József Németh, 6300 Kalocsa, Szabó József u. 3. Interesiĝantoj pri ŝak-festivalo bonvolu informiĝi ĉe s-ro Németh.

# La tutmonda esperantistaro kondolencas

Elkorajn kondolencojn okaze de forpaso de granda homo kaj esperantisto Kalocsay!

Esperanto-Centro Paderborn FR Germanio.

La Helena Esperanto Movado priploras la forpason de la granda aŭtoro de la Esperanta beletristiko kaj kompara filologio d-ro Kolomano Kalocsay. Tiu elstara personeco sekure eniras en la panteonon de la lumo eterna!

Eliopulos prezidanto de M. E. R. K. S. E.

Pere de Universala Esperanto-Asocio mi ricevis la dolorigan informon rilate la morton de s-ro Kolomano Kalocsay.

En la nomo de la estraro kaj de la membraro de la Nederlanda Esperanto-Asocio mi tutkore volas kondolenci vin pro tiu grava perdo. La morto de s-ro Kalocsay estas grava bato por la tuta Esperanto Movado; kiom pli por la Hungara Asocio. Estu certe, ke ni suferas kun vi en ĉi tiu malĝoja tempo.

Mi petas, ke vi transdonu niajn kondolencojn ankaŭ al la parencoj de nia kara mortinto.

Kun sinceraj salutoj, Kooij Waal  
sekretariino L. E. E. N.

Profunde tuŝis min la doloriga sciigo pri la forpaso de la eminenta esperantisto kaj verkisto neforgesebla Kolomano Kalocsay.

La morto de Li estas nemezurebla perdo ne nur por vi, hungaraj esperantistoj, sed por la tutmonda esperantistaro.

Kun lia nomo restos por ĉiam la konscio pri Lia granda majstreco super nia lingvo kaj la memoro pri bona kaj amika homo.

Akceptu miajn plej sincerajn kondolenc-esprimojn kaj mian kunsenton en via doloro!

amike via Lech Kosieniak,  
komitatano de UEA, estro de Pola MEM-sekcio.

La multflanka agado de d-ro K. Kalocsay —  
precipe sur la lingva kaj literatura kampoj —  
estis kolosa kaj meritas nian tutan admiron kaj  
dankemon.

Ni neniam forgesos, ke li—kun sia nesuperebla  
majstreco — tradukis, interalie, ankaŭ el la ru-  
mana poezio.

La nomo de d-ro K. Kalocsay restos ĉiam por  
ĝin ankaŭ al lia familio!

En la nomo de Kunordiga Rumana Esperanto-  
Komitato kaj rumana esperantistaro, bonvolu  
akcepti nian sinceran kondolencon kaj transdoni  
ĝin ankaŭ al lia familio!

Prof. d-ro Aurel Boia, vicprezidanto.

Profunde kondolencas pro la forpaso de la plej  
granda Esperanto-verkisto Kolomano Kalocsay.

Heroldo de Esperanto

Pro la forpaso de d-ro Kolomano Kalocsay  
bonvolu transdoni nian kondolencon al la familio  
de la mortinto!

Esperantistoj de Nyíregyháza.

Kun li malaperis brilanta stelo sur la firma-  
mento esperantista. Li antaŭenpuŝis nian mova-  
don kune kun aliaj pioniroj. Ne eblas per vortoj  
esprimi liajn meritojn. Nur malmultaj suprenle-  
vis la torĉon de nia ideo tiel obstine, tiel forte  
kiel li. Ni kondolencas al la Hungara Esperanto-  
Asocio, kies fervora akcelanto li estis.

Franz Schick,  
en nomo de Redakcio de l'Internaciisto,  
Kolektivo esperantista komunista.

Ĉiloke ni volas esprimi nian dankon pro la  
kondolencaj leteroj kaj telegramoj senditaj al ni:

Familio funebranta de Kolomano Kalo-  
csay, Estraro de Hungara Esperanto-  
Asocio, Redakcio de Hungara Vivo kaj  
Eszperantó Magazin.

JIRI KORINEK

## KREVIS LA KORDO

*Krevis la kordo kiu sonis  
jardekojn majstre noblatone  
instruis nin ekzemplodone,  
al artoceloj altaj spronis.*

*Laŭ voj' de fajna lingvobelo  
en lia verk, ni lernis paŝi,  
trezorojn trovi kaj malkaŝi  
sub lia gvida torĉohelo.*

*Al pleja alto li ascendis,  
al pint' Parnasa, kie ventis  
kaj ofte ŝtormis ĉirkaŭ li.*

*Nun krevis la streĉita kordo.  
Haltis la kor', plu vivos vorto  
al funebrantoj post geni'.*

LUDMILA JEVSEJEVA

## IN MEMORIAM

(Kálmán Kalocsay)

*Amaro venenigas la animon.  
Forrabas tristo fortojn de la kor'.  
La tuta vivo — iluzi' kaj sonĝo,  
Brulige senkompata rememor'.*

*De nun, por ni, fariĝas Vi legendo.  
Ne mortos stelo, en eterna bril',  
Ĉar Via plumo skulptis monumenton  
El la marmoro, sed ne el argil'.*

LAJOS TÁRKONY

## KALOCSAY

*Kalocsay mortis! La plej bona amiko, la  
plej bona poeto de Esperanto, la plej simpatia  
kaj bonkora homo mortis!*

*Apenaŭ dudekjara mi estis, kiam en la  
Esperantaj kunvenoj ni ekkonis unu la alian  
kaj ni interamikiĝis kaj kiam komencis aperi  
Literatura Mondo, li komencis doni al mi tas-  
kojn por la revuo. Kaj tiel mi fariĝis poeto,  
verkisto en Esperanto. Sed ankaŭ en la nees-  
perantista literaturo li vekis mian atenton pri  
interesaj libroj kaj tiel evoluigis miajn litera-  
turajn konojn.*

*Sed li estis ankaŭ bonega kuracisto kaj  
dum nia interamikiĝo li konstante flegis mi-  
an sanon, plurfoje mi kuŝis en lia hospitalo  
kaj ĉiam li sendis min hejmen resaniĝinta.  
Kaj nun mi estas malsana kaj mi jam ne po-  
vas al li plendi...*

*Kalocsay mortis! Homo de belo, de amo, de  
bono — mortis! Mi ploras.*

# REVUO DE REVUOJ

Du artikoloj respondas al la sama temo, pripensante nian influon, niajn rezultojn, parolante pri la „verda kurteno”: LA BRITA ESPERANTISTO (1974. 3—4.) publikis legindan artikolon pri nia UEA de E. L. M. Wensing, kun titolo „*Quo Vadis Esperanto?*”. Li konstatas, ke en nia movado ekzistas internacie sufiĉe disvastiginta organizaĵo, UEA, funkcia kiel tegmenta organo super Landaj Asocioj kaj kelkaj fakaj organizaĵoj. UEA — kiel grupiĝo de libervolaj, laboremaj homoj — povas nenion dekreti al siaj membroj, nenion postuli, kaj dependas de la laboremo, sindediĉo kaj servopreteco de siaj anoj. Post ĉio ĉi la UEA-laborplano estas laŭenhave ambicia, sed „*de facto*” nerealigebla. Laŭ la aŭtoro estas nekredeble, ke sukcesus rapidigi la altiĝon de la nombro de membroj, kio aŭtomate vastigus la kampon de ĉiaspecaj praktikaj aplikoj, kaj krome ebligus ankaŭ konscian vastigon de tiuj praktikaj utiligoj.

Nun nia movado mondrilate havas ĉ. 33 milojn da membroj, inter 1959—1972 tiu nombro kreskis per ĉ. 200 membroj. Laŭ la UEA-laborplano la fina celo estas: la ĝeneraliĝo de la uzo de Esperanto en internaciaj rilatoj. Sed nenio menciinda okazis. La plano montrigis utopia, pro la simpla fakto, ke neniu serioze pristudis kiamaniere realigi tion, kaj neniu ellaboris efikajn metodojn, lertan kampanjon por tiu celo. Sur la kampo de informado oni proponis dediĉi specialan atenton al agadoj en Azio kaj Afriko, al kiuj teritorioj nun aldoniĝas ankaŭ Sud-Ameriko. Estas giganta tasko, entrepreni la solvon. En medioj de kleruloj vivas ankoraŭ la opinio, ke E estas ne pli ol pala imitaĵo de naciaj kulturlingvoj, ia triviala, lingvistike senvalora mikspoto, stufita el diversaj Eŭropaj ĉeflingvoj, kiu neniam povas alpreni la vivkapablon de kiu ajn nacia lingvo. Krome, precipe en Okcident-Eŭropaj landoj, oni ofte aŭdas la rimarkon, ke E estas vidata kiel propaganda atuto de politike maldekstrumaj elementoj. Nia komuna devo estas — skribas Wensing — ĝustigi la opinion pri E, prezenti kaj diskonigi ĝin kiel potencon, racian lingvon, kapablan servi al plifaciligado de internaciaj kontaktoj kiel relative facila dua lingvo apud la gepatra, uzenda ĉie kaj ĉiam kie kaj kiam homoj de malsamaj lingvogrupoj renkontiĝas. La Landaj Asocioj devus funkcii kiel la inform- kaj propagandcentroj en siaj respektivaj teritorioj.

Tre sekvenda estas la propono de s-ano Wensing pri la tutmondaj periodaĵoj. Se ni posedas komunan lingvon, kial do ne eluzi tiun grandegan avantaĝon kaj ĉesigi tuj la eldonon de pli-malpli mizeraj naciaj organoj? Anstataŭe ni distribuu, plurfoje ĉiujare, nacilingvan bultenon, redakcie bonege flegitan, en kiu kapablaj redaktoroj prezentas la multajn flankojn de E, verkas pri ĝiaj celoj, atentigas pri la lingva haoso en la

mondo kaj emfazas la neprecon kaj neeviteblon de de baldaŭa, taŭga solvo.

Kien iras E? — Post preskaŭ centjara agado, analizante niajn metodojn ĝisnunajn, niajn agadprogramojn, ni povas konstati, ke „ili montriĝis senefikaj. Ili ne ŝanĝiĝis kaj ni laboras kaj aktivis kiel niaj avoj kaj pravoj antaŭ 50—80 jaroj... Niaj energiaj pioniroj, niaj batalantoj de la unua epoko grandparte mortis aŭ senaktiviĝis, sed novaj kandidatoj por ŝtopi la breĉojn malfacile troveblas.” Ni devas kompletigi niajn rondojn per junaj fortoj, aŭ pereos iom post iom kaj nia idealo, kaj nia lingvo kaj movado.

„Trarompi la fermitan cirkon” estas titolo de la letero al s-ro H. R. Tonkin en la dana gazeto „Eho” (1976. 1.), publikigita de Boe Seest. Videble, ke tiu gravega direndo estas „ĉiamverda”. Ni kun granda ĝojo salutas la pensoriĉajn liniojn de tiu artikolo, kiuj renkontis unu la alian sur niaj paĝoj, ĉar ankaŭ ni konsentas tiun opinion, ke la celo de nia lingvopolitika movado estas akceptigi E-on kaj utiligi ĝin kiel interkomperenilon inter popoloj de malsamaj lingvoj.

Per tiu dua artikolo ni riĉiĝas per kelkaj suplementaj proponoj al la supre menciitaj: „... estas ne sufiĉe plane evoluigi la prelegaktivecon en la kluboj, estas ne sufiĉe disdoni malgrandajn broŝurojn kaj estas ne sufiĉe kun sporade gazetaraĵoj mencioj aŭ intervjuoj, ktp, ktp. Ĉiuj homoj jam kaj iam anstataŭiĝas. Tial ĉiuj menciitaj aktivecoj en la longa paso ekhavas nenian signifon por pligrandigi la movadon aŭ por trarompi la fermitan cirkon... Publike elstaraj personecoj kaj politikistoj senĉese anstataŭiĝas per novaj homoj, kiuj neniel konas la antaŭajn kontaktojn kaj la antaŭan informan peradon kun la de tio fluanta scio. Se subskribaj kampanjoj kaj informa perado dum la longa paso devus esti fruktodonaj, necesiĝas: 1/ daŭra rekrutigo de sufiĉe altkvalifikitaj homoj ĉirkaŭe en la landoj. Malalte kvalifikitaj homoj donas nur kontraŭan efikon; 2/ buŝa komunikado suplementita per skriba perado. Nur skriba perado estas nesufiĉa kaj senutila, kaj; 3/ ampleksa aliĝo de la anonimaj homoj. Ĉefaj popoloj kaj politikistoj nenian novan povas plenumi aŭ fari, kiu venas „de malsupre”.

Oni povas ankaŭ antaŭpuŝi la klarigon pri la planlingvo kaj ĝia ekzistado, se oni interne de la biblioteka mondo volos krei intereson por Esperanto-revuo. Ne estas bone, ke E-revuoj tute mankas inter la granda amaso de antaŭmetitaj periodaj revuoj en la bibliotekaj legsalonoj. Sed estas treege necese, kiam oni disdonis E-revuojn al la naciaj bibliotekoj, ke ili same kiel aliaj vere kvalitaj multlingvaj revuoj, fariĝos dulingvaj tiel, ke naciaj tekstoj pri la plej gravaj artikoloj staros flanke de la E-tekstoj.”

Mária Rózsa Szabó

## Vidindaj neologismoj

*Neologisme*. Romaneto originale verkita de Lorjak. Eldonis: Fondumo Esperanto, Helsinki 1975. 88 p., 19 cm. Kartonita. Prezo: 10, — ned. gld.

La esperantistoj ne ŝatas la neologismojn. Almenaŭ ne ties trouzon en la tekstoj, kiujn ili volas legi. Sed en tiu ĉi libreto la neologismoj ne troviĝas en la teksto, sed sur la belforma postajo de ĉarma spionino-striptizistino...

Jam la unuaj paĝoj surprizas per la aŭdaca — eble iom triviala — tem-elekto. En la fantazia firmao *Kompanio por la Importado kaj Eksportado de Neologismoj* (KOMIMPEKSNEOL) regas granda konfuzo. Disvastiĝas onidiroj, laŭ kiuj unu el la oficistinoj, certa fraŭlino *Amrevas* havas tatuita sur sia intima korpoparto la portreton de iu — eble iuj — ĉefgvidantoj de la firmao. Kaj sinjoroj *Pjonentart* kaj *Polimiop*, la prezidanto kaj personara direktoro de KOMIMPEKSNEOL timas ne senkaŭze: la konduto de fraŭlino *Amrevas* supozigas, ke ŝi ne nur *revas* pri la amo, sed vaste praktikas ĝin, kaj, kiel sciante, en la ampraktikado ne ekzistas kaŝendaj intimaj korpopartoj...

Do, prezidanto *Pjonentart* kaj direktoro *Polimiop* devas ekagi. Ili volas ekscii unue, ĉu la onidiro estas prava, sed kompreneble por tio necesus vidi tiun intiman korpoparton de fraŭlino *Amrevas*. Kaj ili ekagas...

La romaneto de Lorjak utiligas la metodojn de la okcidenta suspensromano\*, plus la tuto estas spicita per petola erotiko. Ĝia ĉefa virto — krom la lertamana teksto de la historio — kuŝas en la evito de ĉiaj ekscioj: nek la detektivaj, nek la erotikaj elementoj estas trouzitaj, fakte ili ambaŭ ludas subordinitan rolon. La ĉefrolanto de la romaneto estas la facilmova, eleganta, lude frivola, iom burleska humuro, kiun ĝenerale oni atribuas al francoj...

La lingvaĵo fluas klare, meza esperantisto kapablas legi ĝin sen malfacilaĵoj. Tre probable la verketo populariĝos almenaŭ same, kiel la konataj libroj de *Beaucaire*: *Kruko kaj Baniko* el *Bervalo kaj El la vivo de Bervalo* sentaŭgulo.

Post tiom da laŭdoj mi tamen eldiru ion eble tute evidentan: *Neologisme* ne estas literaturo, sed poramuza legaĵo, en sia speco tre bonkvalita. Tamen, en la nuna tempo potencie ĉia legaĵo, kiu legigas la publikon, servas la esperantan literaturon. Kaj estas ne malŝatinde, se tion faras poramuzaĵo originale verkita. Mi volonte atendas pluajn verkojn el la plumo de *Lorjak* (ĉu pseŭdonimo?) por forpeli miajn vesperan lacon kaj kapdoloron.

La sukceson de la romaneto malrapidigos eble nur ĝia harstarige alta prezo.

\* *suspensio*: momento en filmo, teatraĵo, kiam la agado haltante tenas la atenton en streĉa atento.

## Simpatia verslibro

*Por forviŝi la memoron pri ŝi*. — Originala poemaro de *Ueyama masao*. Eldonis: L' Omnibuso, Kioto 1974. 95 p., 19x17 cm., broŝurita. Prezo: 7, — ned. gld.

La nomo de la prozisto *Ueyama masao* estas de longe konata al la ŝatantoj de la originala literaturo, sed por atentaj legantoj de la esperantaj periodaĵoj ankaŭ la poeto *Ueyama* ne estas surprizo. Tamen, unuope aperantaj poemoj donas nur konjektojn: la realaj konturoj de poeto reliefigas nur en volumo.

Ni devas konstati, ke *Ueyama* estas poeto simpata. Tiu ĉi epiteto entenas respekton al lia produkto, sed ankaŭ certan miksitecon de impresoj. La pensoj kaj sentoj spirantaj el la poemoj estas aprobindaj, akceptindaj, la versoj legiĝas kun ĝuo, tamen mankas io, kio kunpremigus la koron aŭ haltigus la spiron de la leganto. Oni sentas la sinceron de la poeto, sed ne sentas, ke ĉion ĉi li nepre devis diri al la homoj, oni ne sentas la vibriĝan streĉitecon de la komunik-devigiteco. Pro tiu ĉi fenomeno foje-foje suferas ankaŭ la deviga intenseco, koncizeco de la poezia lingvaĵo.

La temaro de *Ueyama* estas vasta: li prikantas la memoron de sia mortinta edzino — la titolo de la poemaro aludas al ŝi —, aperas filozofiaj poemoj, sed li alfrontas ankaŭ politikajn temojn. Tamen, la nivelo de la poezia rekreado de la temoj multe varias. Al la vivoferinta *Jui* li komencas poemon per strofo apenaŭ efikanta tre originala:

„Pli dense, peze super nia mond'  
obskura pendas la militminac':  
Plenumas l' ambicion jam sen hont'  
la man' sangmakulita kontraŭ pac'.”

La komencaj versoj de *Kantas la vjetnama patrino* jam estas multe pli impresaj:

„Kiam venos ree nin kolomb'  
forfluginta el la fum' de bomb'?”

Same alternas versoj malfortaj kaj sukcese faritaj tra la tuta volumo. Tamen, la tuto donas ne malŝatindan bildon pri la poeto *Ueyama*. Li evidente ne postrestas al la establiĝinta nivelnormo de la esperanta poezio, kaj *Por forviŝi la memoron pri ŝi* certe trovas plaĉon ĉe la plimulto de la esperantistaj poeziamantoj.

V. Benczik

# Postmarkoj kaj milionoj

Jena titolo aludas unuavice ne al la mone mezurebla valoro de la poŝtmarkoj, sed al la milionoj da homoj, kiujn ekkaptas ilia sorĉo. Ne estas facile diveni, kio estas la ĉarmo de la poŝtmarkoj; ni devas rekoni nur la fakton, ke la poŝtmarko-bildoj prezentas la homon kaj lian mondon, la prezencon kaj la historian paseon, kelkfoje eĉ la futuron; do, iu ajn persono, interesiĝanta pri io ajn, trovas la ŝatan temon.

La Hungara Poŝto inter la unuaj ekkonis la riĉajn eblecojn kaŝigantajn en la enhava kaj arta elformado de la poŝtmarko-bildoj. Eble neniu kampo de la penso-mondo de l'moderna homo forestas sur la bildoj de hungaraj poŝtmarkoj.

Rilate la arton, sur la hungaraj bildoj estas prezentitaj kaj la kreaĵoj de elstaraj hungaraj pentristoj, kaj la majstro-pentraĵoj de famaj eksterlandaj artistoj, konstante ekspoziciataj en Budapeŝtaj muzeoj.

La hungaraj sportistoj atingadas laŭdindajn rezultojn; niaj poŝt-

markoj prezentantaj ilin mondfamas, pro multaj ni ricevis poŝtmarko-artajn premiojn. La eldonaĵoj je honoro de la hungaraj olimpiaj ĉampionoj tutmonde atestas pri niaj sukcesoj dum la olimpikoj.

La hungaraj poŝtmarkoj atente sekvas, paŝo post paŝo, la submetigon de la kosmo far la homo. Antaŭ dekkvin jaroj, kiam la heroa soveta kosmonaŭto ĉirkaŭflugis la Teron, la unua poŝtmarko pri tiu evento estis hungara.

Ni prezentis surbilde la plej elstarajn reprezentantojn de la literaturo, muziko kaj scienco hungaraj: Ferenc-on Liszt, Bartók-on kaj Kodály-on, Petőfi-n, Arany-on, Attila-n József. Ni ĉiam rememoras ankaŭ tiujn eksterlandajn ar-

tistojn, kiuj servis la aferon de la homa progreso.

En la jaro 1957 aperis duobla poŝtmarko je la 70-a datreveno de Esperanto kaj la 40-a de la morto de Zamenhof.

La hungaroj mondfamas pri ilia gastamo, tial ni plezure aperigadas surbilde la belajn hungarajn pejzaĝojn (Balatono, Danubkurbiĝo, Budapeŝto). La eldono propagandanta la turisman jaron aperis en dek milionoj da ekzempleroj — tiom da loĝantoj havas nia lando.

La poŝtmarkoj simbolas la opajn landojn. Milionoj da leteroj, permanente de poŝtistoj, alvenas al ĉiuj mondanguloj; sed la poŝtmarkoj disvastiĝas ankaŭ pro la pasio de filatelistoj. La entrepreno „Philatelica Hungarica” alsendas la hungarajn poŝtmarkojn al 60 eksterlandaj poŝtmarko-komercistoj, kiuj disvendas ilin al la emaj kolektantoj.

La poŝtmarko estas rilatilo, interpopola ponto. Perhelpe de ili ni ekkonas aliajn popolojn kaj ekkonigas tutmonde la vivon de la hungara popolo.

## Kolektu hungarajn poŝtmarkojn!




Ili tutmonde akireblas pere de poŝtmarko-komercistoj!



# Pago de FERI'

## Konkursa enigmo



Laŭ la interkonsento de nia redaktaro kaj tiu de la populara hungarlingva poramuza semajna revuo „Füles”, ĉi-numere ni publikigas konkursan enigmon. Ĉirkaŭ en la sama tempo (en iu junia numero) Füles publikigas nian enigmon hungarlingve. La solvantojn de la enigmo, krom la kutimaj premioj, ankaŭ la redaktaro de „Füles” donacos per apartaj, valoraj premioj. — Kompreneble: per lotumado.

En la ĉefaj linioj de nia enigmo ni kaŝis citaĵon el la ĉefverko de la hungara dramliteraturo. (Horizontale 1. kaj vertikale 44.) La titolo de la dramo: 26. vertikala; la nomo de la tradukisto: 48. vertikala.

Ensendi sufiĉas solvon de tiuj vicoj, ĝis la 15-a de aŭgusto.

**HORIZONTALAJ VICOJ:** 14. OT, 15. Tuto de generacioj de la sama familio (R), 16. Libera tago sen laboro, 17. Kunmeti diversajn partojn de maŝino (R), 18. Sentos impreson de surprizo, 20. Specio de turdo, kantbirdo, 21. Koloro, 22. Filo de Dedalo, la unua viktimo de flugado, (sen „o”-finaĵo), 23. La materia parto de la homo, 24. Diri malveron (R), 25. Filo de frato aŭ fratino (R), 26. Franca esperantisto, fondinto de SAT, 27. Ventkaptilo de boatoj, 28. Batalon komencanto, 30. Posedus, 32. IG, 33. Sennacieca Asocio Tutmonda, 34. Sidrimedo por rajdi (R), 35. Cirkloforma, 37. AP., 39. Adverbo, signifanta „en alta grado”, 41. La kvara monato, 43. Al kiu apartenas?, 44. Numeralo, 47. Substanco uzata por meblofarado, brila farbo-tavolo., 49. Enpaŝi (R), 51. Neniel diferencigebla de la alia, 52. Angla artikolo, 54. La sama en Esperanto, 55. Pervorte sciigis, 57. Ŝati kare iun, 59. Komenco de ornamo!, 61. Monogramo de

la poeto, nomata sub 48. vertikala, 62. Brillblanka globo el perlamoto, uzata kiel juvelo, 64. Muzika blovinstrumento, 68. Pola Esperanto Asocio, 69. Fabela estaĵo, virina, 70. Parto de solida korpo (R), 71. Devenantan el Teherano, 74. La tuta ŝiparo de unu lando, 75. Ilo por defroti aŭ skrapri (R), 76. Gason, kiu ĉirkaŭas la teron, 77. Kaŭzo, motivo, 78. Kapabla utiligi la akiritan scion, 79. Maniero de estado (R), 80, Hak-, kaj pik-batalilo, 81. Demanda pronomo, adjektiva, 82. IY.

**VERTIKALAJ VICOJ:** 1. Noma, sen la efektiva povo kaj rajto, 2. Ceremoniaro ĉe solenaĵoj, 3. Matena krepusko (R), (en la unua kvadrato staras diftongo), 4. Ne plu teni (R), 5. Verba finaĵo, 6. Propono de varoj aŭ servo, 7. Preni fluaĵon el iu loko aŭ ujo, 8. Refaldita bordero ĉe tuko, 9. Supernatura estaĵo, 10. EO, 11. La lasta vorto de preĝoj (sen „o”-finaĵo), 12. Serio da lecionoj, 13. Leviĝanta akvomaso, 19. Carmegas estigante entuziasmon, 20. Natura altaĵo da roko aŭ tero, 21. Silka kotona aŭ lana ŝtofo (R), 23. Alta herbo, kreskanta precipe ĉe lagoj, 24. Mara, blanka aŭ griza naĝbirdo (R), 27. Konvena al reguloj, kondiĉoj aktualaj (R), 29. Dombesto (R), 30. Epiteto por bravuloj de historio, aventuroj, ktp., 31. Klingo de plugilo (R), 32. La plej alta perfekteco (R), 34. Truon fari en barelon, 36. Afrika riverego (sen „o”-finaĵo), 38. Densa tufo da haroj, uzata interalie por farbi (R), 40. Tre-tre, 41. La unua homo, 42. Duono de letero!, 45. Frukto (R), 46. Kiel 51. horizontala, 50. Kurba ostoj, ĉirkaŭanta bruston (R), 53. Disrompi terbulojn (R), 56. Starantan antaŭ la oka, 58. Kuro de manĝaĵo en bolanta oleo aŭ graso, 60. Tute certe, 63. Duobla interna organo de homoj (R), 64. Specialisto pri religiaj aferoj, (R) 65. Mallongigo por asocio de nacioj, 66. Ne praktika, 67. Provizora konstruaĵo por loĝi (R), 69. Koloro, 72. Plektaĵo kun grandaj interspacoj, 73. Mallonga memoriga skriba resumo, 75. Gil... fama franca romanheroo, 77. Samspecaj literoj de kuleto, 78. Kiel 81. horizontala, 80. Kemia simbolo de galiumo, 81. KG.

La ĝusta solvo de nia enigmo aperinta en HV 76/1 estas: ... „Kaj revenu en la ordon/ en konsento por konstrui/ la surteran paradizon/ kaj donitan vivon ĝui”

Libropremion gajnis: V. Beškarev el USSR, Jenő Dobos el Hungario kaj Lars Jorgensen el Danlando.

## LINGVAJ LUDOJ

Ci-foje ni prezentas la ludon, nomatan: PALINDROMO. Laŭ PIV ĝi estas: „frazo aŭ verso, kiun oni povas legi en ambaŭ direktoj”. PERFEKTA ĝi estas, se inverse legante ni ricevas la saman tekston kiel normale, DUSENCA, se inverse havas alian signifon.

Por modelo ni citas kelkajn perfektajn palindromojn: ROMA TIBI SUBITO MOTIBUS IBIT AMOR (latina), MADAM, I'M ADAM (angla), BEI LEID LIEH STETSHEIL DIE LIEB (germana), RÁM NÉMET NEM LEL, ELMENTEM ÉN MÁR (hung.) ...-kaj ni faris kelkajn esperantlingvajn:

SAMA NOTARI' PIRATON AMAS. ARAK IRAS AMUZI, ZUMAS ARI' KARA; SIMON LA NOMADAN ADAMON ALNOMIS. SAĜA NEGRO ZORGE NAĜAS. JA KIAL NOMIS NIN SIMON LAIKAJ?

Sendu al ni similajn (maksimume po kvin, persone), la ensendintojn de la plej bonaj solvoj ni donacos kaj iliajn frazojn ni publikigos.

Limdato: kiel tiu de krucenigmo.

Jen la ĝusta solvo: Dresen, Bastien, Urbanova, Varankin, Tonkin, EMBA, Unuel, Lanti, Kabe, Osmond, Bleier.

Libropremion gajnis: T. Löwenkopf el Israelo, Zsuzsanna Csizsár kaj Károly Benkő el Hungario.

# LETERRKESSTO

D-ro Martin Schüler el GDR letere proponis al ni komenci novan rubrikon, por prezenti en ĝi hungarajn proverbojn, parolturnojn en laŭvorta Esperanta traduko, kaj aldoni klarigojn, kiuj helpus trovi la ekvivalenton en la internacia lingvo. Tiu rubriko — laŭ nia korespondanto — povus prezenti la hungaran pens- kaj esprimmanieron, popolkutimojn; kaj samtempe ankaŭ pliriĉigi la Esperantan proverbaron.

Ni konsentas: vere estus utile, kaj interese, sed tiun celon jam plenumas ja la frazeologia kolektaĵo jarfine aperinta sub titolo: Domfabriko. (Vidu nian recenzon en HV 76/1)

Fininte la leteron, d-ro Schüler plendis pro la malfrua ricevo de nia revuo, kio malhelpis al li ensendon de la enigmo-solvo. — Similajn rimarkojn ni legis en pluraj aliaj leteroj, kaj ni devis sperti, ke lastatempe la nombro de la ensenditaj solvoj malpliigis. *Denove do ni sciigas la enigmoŝatantojn, ke la menciita limdato havas nur karakteron informan, neniun retenu do la eventuala malfrua apero aŭ ricevo de la revuo.*

La ĵus menciitan temon: aperon de la frazeologia kolektaĵo de Ada Császár kaj Kalocsay tuŝas ankaŭ letero de s-ro J. Ph. Punt, el Nederlando. Li — kiel unu el la eksterlandaj kunlaborantoj, kontrolinto de la internacia komprenebleco — povis legi ĝin jam en manuskripto, kaj nun, ricevinte la honor-ekzempleron li skribis: „Jam la unua ege supraĵa foliumado montris, ke temas pli lingva trezoro, kiu, se prudente kaj kritike manipulata, multe utilos al la posedantoj.”

Samletere s-ro Punt sciigis nin, ke „Dum la lastepasintaj jaroj mia opinio pri la utilo, neceso kaj danĝero de la neologisma trokresko se ne turniĝis en la malon, tamen modifiĝis en senco favora. Pri tio mi intencas skribi ankaŭ al la eminenta kunaŭtoro de tiu ĉi verko, al s-ro Kalocsay.” — Bedaŭrinde, al li skribi jam ne eblas, sed via opinio en artikola formo certe interesus nian legantaron...

„Treege plaĉas al mi via laborplano: dediĉi apartajn numerojn por apartaj temoj kaj por elstaraj personoj. Per tio vi forte evoluigos la sisteman plivastigon de informoj pri ne sole la hungaraj, sed tutmondaj E-aktivuloj, ĉar nek Kalocsay, nek Petőfi, Jókai, nek Szathmári plu estas nur hungaraj! Same la temoj, kiel arttradukado, scienca fikcio, turismo, ktp. estas tutmondaj, kaj mi ĝojas, ke Hungara Vivo konstante pli kaj pli fariĝos t u t m o n d a Esperanto-revuo kun forte kreskanta renomo.” — skribis s-ro Johannes Palu el Estonio. Ni ĝojas, ke tiu redakta sistemo

plaĉas al Vi, kaj ni esperas, ke al multaj aliaj legantoj simile. Ankaŭ por la sekvontaj numeroj ni klopodos doni indan, interesan ĉeftemon, foje el la hungara vivo kaj kulturo, historio ktp., foje el aliaj tutmondaj, aŭ Esperantaj sferoj.

Pluraj niaj korespondantoj, ekz. Venda Loiv el Estonio, Oskar Stolberg el GDR, M. Rucz el Ukrainio laŭdis iniciaton de L. Rieth, kiu en nia revuo komencis rubrikon „Verda anteno” — pri esperantlingvaj radio-dissendoj; respektive ili rimarkis la forreston de tiu rubriko en la postaj numeroj.

— Fakte, estus bezonata la reeĥo, kaj niaj kolegoj, agantaj en la kampo de radiofonio meritis pli da atento, sed bedaŭrinde nia revuo aperas tiel malofte, kaj pasigas tiel longan tempon en presejo, ke ni neniel povus esti aktualaj, pro tio tiun taskon ni ne povas plenumi, kiel la pli ofte aperantaj gazetoj.

## Korespondi deziras

El GDR: s-ino Marlis Schulze, 153 Teltow, Lilienthal str. 2. V. teknika desegnisto; f-ino Heike Lisl, 1532 Kleinmachovv, Machnovver Busch 6. lernantino; s-ro Albert Pehrson, 153 Teltow, Havel str. 6. c. elektro-inĝeniero.

El Hungario: s-ro Dénes Fiatal, Budapest, 1012, Attila u. 133. Maŝinĝeniero, serĉas kontakton kun samfakuloj por konsulti pri fakaj problemoj; s-ro István Csillik, 6235 Bócsa III. 127 — junulo, ĵus fininta industrian mezlernejon, interesiĝanta ankaŭ pri humanaj temoj; s-ino Éva Mezőné, 4028, Debrecen, Kemény Zs. u. 5. — deziras perleteran kontakton kun mezaĝaj gesamideanoj; fino Erzsébet Homoky, 4032, Debrecen Tanácsköztársaság u. 62. II. e. 9. — studentino, estonta matematikisto; s-ro András Borka, 6772, Deszk, Alkotmány u. 14; s-ro Sándor Móczár, 6100, Kiskunfélegyháza, P. f. 31. — poŝtisto, korespondus kun samfakuloj.

El Italio: Ricci Rita (instruistino) Via Barzoni 4, 20100 Milano; Maria Rosa Galli (25-jara) Piazzale Corvetto 7, 20100, Milano; Birone Maria Stella (instruistino), Via Trasimeno 22/5, 20100, Milano.

El Rumanio: f-ino Tünde Páll, COVASNA, Stefan cel Mare 65.

El Svedio: s-ro Jan Vedevik, Poste restante, 40101, Göteborg I. — 56-jara, korespondus kun esperantistinoj pri diversaj temoj.

 HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio  
1368 Budapest, Hungario,  
VIII. Kenyérmező u. 6.  
Aperas dumonate  
XV. jaro. 1976. 2-a numero

Cefredaktoro: Mihály Gergely  
Responda redaktoro:  
d-ro István Nagy  
Arta redaktoro: Jozefo Szekeres

Redaktoraro:  
Szilárd Bálint, Vilmos Benczik, Ada Császár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, d-ro Lajos Lesznai, László Rieth, Mária Rózsa Szabó, Tibor Ujlaki-Nagy

Cefkunlaborantoj:  
Paŭlo Balkányi, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechan, Aurél Ponori Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi, Lajos Tárkony

Redakcio: Budapest VIII.,  
Kenyérmező utca 6.  
Telefono: 141-078, 137-872

Eldonas: „Népszava” Gazeteldona  
Entrepeno, Budapest VII., Rákóczi  
út 54.


Responda eldonisto: Márton Gábor  
direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoŝtatoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215—96162 1900 Budapest V., József nádor tér 1.) senpere, aŭ per poŝtmandato.

La abono estas por jaro (ses numeroj)  
Ft. 48.—, al eksterlando krome  
Ft 9.60 por afranko.

Peranto al eksterlando: KULTURA,  
H—1389 Budapest P.O.B. 149  
Abonprezopor unu jaro (ses numeroj):  
7,— Usonaj dolaroj aŭ egalvalora  
sumo en alia valuto

477 76. 1., Somogy m. Ny. 3000  
Responda gvidanto:  
Béla Farkas direktoro  
Indexszám: 25 377




POR  
REFREŠIGO  
VOJAGO

**AUTOSIFONO**

FABRIKAS: HŰTŐGÉPGYÁR (FRIDUJFABRIKO)



## Konsumturist



Valoraj artobjektoj  
porcelano de bona marko  
stilmebloj

Varojn aĉetitajn  
en supraj vendejoj oni povas  
sendogane elporti el la lando

Vi povas aĉeti el granda sortimento kontraŭ valuto  
internacie ŝanĝebla

en niaj vendejoj en Budapeŝto:  
1., Hess András tér 3.